

1983 februaro

76a jaro

n-ro 926 (2)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Sadler (dekstre) retiriĝas post pli ol 20-jara servo

Vi trovos

(kaj tion vi certe scias eĉ el via propra sperto), ke foje estas damne malfacile plenumi firman promeson. Ne helpas eĉ, se oni kunigas tagon kun nokto, tio lastatempe okazis al nia najbaro. Tion pri nia pasintnumera facilanima uzo de la vorto "baldaŭ". Ni parolu pri io serena kaj ĝojiga! Ekzemple, pri tiu industrio, kiu naskiĝas por nutri la komencantojn per facilaj tekstoj. Ni parolas pri tiuj planoj de IKSo ek Zagrebo, kiu amplekse raportas pri siaj spertoj sur la paĝoj 28-29. Ĉu ni malkovros la ĝustajn mezurojn de tiu nuntempa movada kampanjo favore al la novuloj? Kompreneble, plej juste estus, se iu komencus atenti ankaŭ tiujn, kiuj jam lernis la unuajn 500 radikojn kaj nun volas konatiĝi kun pliaj mil. Oni ja ne povas ĵeti sur tiujn homojn tuj *Plenan ilustritan vortaron*, eĉ se ili jam legis *La sentimulon*. Ĉu niaj fotoj ĉi-foje estas pli sukcesaj ol tiuj en januaro? Ĝis poste!

Enhavo

- 21 Kunsido de la Estraro de UEA: Sadler foriros en majo ĉi-jare (sm)
- 22 Iniciatoj: Kulturaj informiloj (Baldur Ragnarsson)
- 23 Membrostatistiko de UEA: Bolanta kaldrono (Simo Milojević)
- 24 Internaciaj Ekzamenoj de UEA: La unuaj ekzamenoj okazos dum la UK en Budapeŝto
- 26 Regularo pri la Fondaĵo Antoni Grabowski
Ĉi-jara kongreslando: Hungario kaj ĝia ĉefurbo (Vilmos Benczik)
- 28 Instruado: Spertoj pri la zagreba metodo (Zlatko Tišljär)
- 30 Hinda Unio: Vizito de tri japaninoj
- 31 Recenzoj: "Proverboj de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof" de A. Holzhaus (R. Ŝulco); "Mia vivo" de Trifon Ĥristovski (G. Berveling); "Hieraŭ — hodiaŭ — morgaŭ" de Bernard Golden (C. Conterno); "Esperanto kaj libereco" de Max Roy Carrouges (R. Vetter); "Metamorfozoj..." de M.C. Jullian (R. Rossetti); "Blanka sablo" kaj tri aliaj vjetnamaj libretoj (M. Haase)
- 34 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en/pri la Internacia Lingvo)
- 35 TEJO-paĝo: Triafoje en Strasburgo (Norbert Silling); Vervo en Sud-Ameriko; Labortendaroj
- 36 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 37 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA; Anoncetoj
- 39 La membraro de UEA en 1982 (statistika tabelo)

La kovrilo

Kiam ni volis trovi konvenan foton, por dediĉi la ĉi-fojan kovrilon al la gvida oficisto de la Asocio, ni spertis malfacilaĵojn. Kial? Nu, rigardu la kovrilan bildon kaj vi tuj komprenos: estrarano (Tonkin) unuaplane, kaj oficisto (Sadler) fone. Tiel ja estas plej ofte ankaŭ en la praktiko — estraranoj sur la scenejo, oficistoj post la kulisoj. Oni ankaŭ inklinas dividi la lastatempan historion de UEA je la "epokoj" de unuopaj prezidantoj (ekz. Maertens, Tonkin ktp). Tamen, ni povus multe pli facile nomi la lastajn du jardekojn en la vivo de UEA — la epoko de VS (se vi jam divenas kiu kaŝas sin malantaŭ tiuj inicialoj). Ne estas malfacile kredi, ke Sadler influis la Asocion pli funde kaj larĝskale ol tion faris pluraj prezidantoj aŭ estraranoj kune. Kiel tio kutime okazas, ni komprenos la grandecon de la kontribuo de Victor Salder al UEA kaj Esperanto ĝenerale nur post lia foriro el la gvida posteno, pri kio vidu la apudan paĝon.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvtilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.


Estrarano pri faka agado: s-ro Petăr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

Sadler foriros en majo ĉi-jare

Post sep sinsekvaj jaroj en kiuj la spezoj de UEA saldiĝis pozitive (kun profito), la financaj rezultoj de la Asocio en 1982 minacis rompi tiun belan tradicion. Tio estis unu el la ĉefaj konstatoj kaj diskuttemoj en la kunsido de la Estraro, de la 7a ĝis la 9a de januaro en Roterdamo. Kvankam la Estraro ankoraŭ ne disponis pri la definitiva spezokonto por la pasinta jaro, laŭ la provizoraj kalkuloj ŝajnis klare, ke la financa jaro 1982 portos al la Asocio konsiderindan negativan saldon. Intertempe, post la kunsido, saldiĝis la spezoj de la Grafika Centro de UEA en Antverpeno — kaj jen surprizo! — ili estas tiel bonaj, ke GCA "savas" la spezokonton de la Asocio kaj transformas la atenditan deficiton en profiton. Detalojn ni tamen lasu por la revunumero kun la Estrara Raporto, des pli ke ili ne signifas, ke la atento al la financa evoluo de la Asocio fariĝas malpli aktuala.

Al la ĉeestantaj estraranoj (la kunsidon partoprenis ĉiuj ok) kaj funkciuloj de la oficejoj de UEA ne



Ĉiam en la fono: Sadler diktas kunsidan protokolon

estis malfacile trovi la kaŭzojn de tiu negativa financa minaco. Inter tiuj kaŭzoj oni elstarigis la sekvojn de la ĝenerala ekonomia krizo en la mondo por la funkciado de nia Asocio. Tiurilate estas notinde, ke ĝuste en la periodo, kiam tiu krizo pleje manifestiĝas, UEA ne ŝanĝas sian bazan (guldenan) kotizon, kiu laste altiĝis por la jaro 1981. Aliflanke, la Asocio ne troviĝas en vere kriza financa situacio, interalie, dank'al la fakto, ke pluraj kapitalaj kontoj kaj fondaĵoj tre kontentige kreskis dum la pasinta jaro.

Alia grava temo de la kunsido estis la administrado, t.e. la funkciado de la asociaj oficejoj, kaj ĉefe de la CO en Roterdamo. Kiel vi povas legi en anonco aliloke en ĉi tiu numero, UEA nun serĉas entute kvin plentempajn geoficistojn, por okupi la postenojn, kiuj jam vakas aŭ baldaŭ vakos en la Oficejo. Ankaŭ ĉi tie ne temas pri ia aparta krizo sed pri deziro plivastigi la profesion agadon de la Asocio sur novaj agadkampoj (ekzemple: turismo kaj eldonado). Necesas tamen klarigo pri unu el tiuj postenoj, kiuj baldaŭ vakos, tiu de la ĝenerala direktoro de UEA:

D-ro Victor Sadler, kiu laboras ĉe UEA en Roterdamo jam pli ol dudek jarojn (el kio plej longe kiel direktoro de la CO aŭ ĝenerala direktoro de UEA), forlasos sian postenon fine de majo ĉi-jare. Li planas translokiĝi al Brazilo. Sadler klarigis, ke lian decidon ne motivis ia malkontento pri la laboro en la Centra Oficejo, sed ke temas pri "pozitiva logo de nova vivmedio". Ĉar dudek jaroj efektive estas longa periodo en unu oficejo, la Estraro povis nur akcepti la decidon. Restas al ni esperi, ke troviĝos manieroj en kiuj la plej kompetenta oficisto de UEA ankaŭ estonte restos utila al la Asocio kaj al la Movado ĝenerale. Aliflanke, estas vero, ke la foriro de Sadler kreas en UEA malfacile plenigeblan vakuon, kaj la Estraro nun serĉas minimume du personojn, kiuj transprenos la ĉefajn taskojn de la preter percepteblo multflanka Victor Sadler.

Multan atenton la Estraro dediĉis ankaŭ al la funkciado de la oficejoj en Antverpeno, Budapeŝto kaj Nov-Jorko. Ĉar la unuaj du — Grafika Centro kaj Scienca Eldona Centro — rekte ligiĝas al la produktado de libroj, la Estraro havas fortan opinion, ke necesas starigi ilian funkciadon sur pli profesion bazon i.a. per dungo de plentempa gvidanto/redaktoro de la Eldona Fakto de UEA. Oni tiamaŭ niere volas certigi la necesan kvaliton al la eldonaĵoj kaj — kio ne malpli gravas — mallongigi la vojon inter la pretiĝo de difinita manuskripto kaj ĝia apero libroforme. Okazas — ĉefe pro manko de tia kunordiganto —, ke la Asocio en la lastaj jaroj anoncis la planojn eldoni tutan dudekon da titoloj, el kiuj pluraj estas prespretaj, sed ankoraŭ neniu efektive aperis. Krome, tiu nova posteno devus pozitive influi ankaŭ la laman eldonritmon de la asociaj periodaĵoj (Jarlibro, *Esperanto*, *Kontakto*).

Kiel kutime, la kongresaj demandoj postulis multan kunsidan tempon, ĉi-foje ankaŭ pro tio, ke oni atendas plurmilan partoprenantaron en la 68a UK en Budapeŝto. El prikongresaj decidoj de ĝenerala inte-

reso ni menci la planojn kombini la Esperantologian Konferencon kun aranĝo por ne-movadaj lingvistoj, okazigi kvizon pri la 75-jara historio de UEA kaj pedagogian seminarion en la kadro de la 21a sesio de Somera Esperanto-Universitato en Gyula. Aliflanke, oni ne planas aŭkcion en Budapeŝto. Multaj kongresanoj ĝojos scii, ke la Estraro decidis insisti ĉe la LKK trovi manierojn, ke la libroj eldonitaj de UEA estu aĉeteblaj en Budapeŝto kontraŭ loka valuto kaj je maksimume eblaj favoraj prezoj, pri kio intertempe favore esprimiĝas ankaŭ Hungara Esperanto-Asocio.

La Estraro detale traktis la progreson de la agadoj pri la Jubilea Jaro 1987 (vidu nian januaran ĉefartikolon) kaj decidis akcepti la proponon de Internacia Kultura Servo (IKS) el Zagrebo (Jugoslavio), ke tie en 1987 okazu la festivalo "Cent jaroj de la Esperanto-Kulturo". Lige al la traktado de ĉi tiu propono, la kunsidon parte ĉeestis ankaŭ speciala reprezentanto de IKS, s-ino Judita Rey-Hudeček.

La ĉefajn kunsidajn temojn sur la kultura kaj

eduka kampoj traktas du apartaj artikoloj en ĉi tiu revunumero. Aliloke (p. 26) aperas ankaŭ la regularo (akceptita en la kunsido) de la nova kultura fondaĵo de UEA, por kiu la kapitalon grandanime donacis s-ro Adamo Pablo Goralski (Kanariaj Insuloj). Temas pri la sumo de 13 750 usonaj dolaroj (ĉ. 36 000 gld) el kiu la unuaj premioj estos anoncitaj en 1984.

La Estraro faris plurajn decidojn ankaŭ pri la agado sur la kampoj de la eksteraj rilatoj, junularo, esploro kaj dokumentado, faka kaj landa agado ktp. Du detaloj povus interesi multajn legantojn: Estonte la regula subvencio el la Propaganda Konto al la Fondaĵo Canuto egalos al 100 kotizoj de membro-abonanto (nun 6 250 gld); en 1983 la Estraro asignas al la sama Fondaĵo ekstran sumon de 1 750 gld., specife por solvi la remembrigon de kelkdeko da membroj en Irano, kiuj nun frontas grandajn transpagajn problemojn.

La venonta kunsido de la Estraro okazos en Roterdamo de la 15a ĝis la 17a de aprilo 1983.

sm

INICIATOJ

Kulturaj informiloj

Internacia uzo de Esperanto memsekve kontribuas al interkultura informiĝo. Tia informiĝo en la nuna stadio okazas plejparte sur la tereno de literaturo, kaj ja tre malegale, konsiderante unuopajn literaturojn. Unu vojo por pli efike utiligi niajn potencialajn rimedojn por interkultura informado estas havebligi al la esperantistoj koncizajn, nepre fidindajn informilojn pri la etnaj kulturoj de la mondo sur egalrajta bazo. Tiaj kulturaj informiloj povus servi, tradukitaj en la diversajn lingvojn, ankaŭ al neesperantistoj, ĉar efektive urĝe mankas tiaj, facile alireblaj, informoj pri la granda plimulto de kulturoj, krom en la plej vaste uzataj lingvoj. Bone konata estas la fakto, ke tre malegale, kaj ofte misinforme, prezentiĝas diversaj kulturoj en ĝeneralaj lernolibroj tra la mondo. Eventuale eĉ iuj ŝtataj edukaj instancoj interesiĝus pri utiligo de tiaj informiloj, devenintaj el internacia, per-Esperanta kunlaboro, en la instruado de geografio, historio kaj sociaj fakoj.

Pasintjare, en la 67a UK en Antverpeno, la Komitato de UEA faris rezolucion pri lanĉo de planado, preparado kaj eldonado de tiaj informiloj pri la kulturoj de la mondo, konforme al la supre esprimitaj argumentoj. La Komitato komisiis al la estrarano pri kulturo verki planon por tiu projekto, kiu enhavu i.a. liston de prioritatoj en la eldonado ("malgrandaj" kulturoj) kaj proponojn pri verkontoj. Ĝi ankaŭ rekomendis, ke strukture kaj enhave tiuj kulturaj informiloj estu verkataj laŭeble laŭ difinita modelo.

Estis akceptite, ke la informiloj enhavu almenaŭ la sekvantajn erojn:

- 1. Situo kaj kulturo:** Rilatoj inter kulturo kaj fizikaj medioj: situo de lando aŭ regiono, tero, maro, ktp. Tamen ne temu pri topografiaj detaloj, krom en esceptaj kazoj.
- 2. Historio kaj kulturo:** Rilatoj inter historio de popolo aŭ etno kaj ĝia kulturo.
- 3. Lingvo kaj literaturo:** Signifaj faktoj pri la kulturportanta lingvo, statuso de literaturo en la koncerna kulturo.
- 4. Edukado:** Ĝisdate koncizaj, sed kontentige detalaj informoj pri la sistemo kaj stato de la ĝenerala edukado en la koncerna kulturtereno.
- 5. Religio:** Kredo, eklezio, religiaj kutimoj.
- 6. Tradiciaj kutimoj:** Priskribo de tiuj, festotagoj, tradiciaj kaj ĝeneralaj distraĵoj, manĝaĵoj, vestaĵoj, salutmanieroj, vizit-kutimoj, konversaciaj tendencoj.
- 7. Ekonomio:** Ekonomiaj cirkonstancoj, plej gravaj vivrimedoj, vivniveloj, laboraj kondiĉoj.
- 8. Reĝimo:** Fidindaj informoj pri la politika bazo.
- 9. Trafikebloj kaj komunikiloj:** trafikaj servoj, telefono, gazetoj, radio, televido.
- 10. Sanitaraj servoj:** Sistemo, sanstato.
- 11. Utilaj vortoj kaj esprimoj.**

Por garantii mondvastan utiligeblon de la informiloj ili devas esti koncizaj, laŭfaktaj kaj neŭtrale prezentitaj. Kaj ili devas esti modere ampleksaj, prefere nur kvar paĝoj de la formato A4 (la eldona formato tamen povas esti alia).

La Estraro de UEA petis la subskribinton servi kiel redaktoro de la kulturaj informiloj, almenaŭ provizore, kaj s-ron Uwe Joachim Moritz (FR Germa-

nio) servi kiel kunredaktoro. Ni nun serĉas eventualajn verkontojn de unuopaj informiloj, el la diversaj kulturterenoj. Mi petas interesatojn skribi al mi (vidu la adreson sur la dua kovrila paĝo), kaj aldoni necesajn personajn informojn rilatajn al plenumo de tia tasko. Manuskripta teksto de kultura informilo pri Islando estas havebla al tiuj, kiuj eniros la verkadan programon.

Baldur Ragnarsson,
estrarano pri kulturo

MEMBROSTATISTIKO DE UEA

Bolanta kaldrono

Eĉ se vi tre atente studos la statistikan trarigardon pri la membraro de UEA dum la pasinta jaro (vidu la paĝon 39), vi venos al malĝustaj konkludoj. Unu el tiuj eraraj juĝoj povus esti la konkludo, ke malmulto ŝanĝiĝis kompare kun la jaro 1981: la Asocio "perdis" 171 individuajn membrojn, kaj "gajnis" 240 aligitajn membrojn, por tiel unuafoje en sia historio superi 30 000, kiel la sumon de la membraro de la aliĝintaj landaj asocioj. Tiu rekordeto, kutima dum la lastaj jaroj, apenaŭ meritas apartan atenton. Kio ja meritas atenton — pro tio oni eĉ publikigas ĉi tiajn statistikaĵojn — estas la vojo, kiu kondukas al la jaraj finsumoj de la membraro de UEA. La tuta drameco de la jaraj statistikoj riveliĝos nur al tiuj, kiuj laŭlande komparos la donitaĵojn pri 1982 kun tiuj pri 1981 en nia pasintjara februara numero. Se vi faros tiun komparon, vi komprenos, ke la membraro de UEA pli simi-



Kongresanoj en Brazilio en 1981: Multaj sudamerikanoj aliĝis tiam al UEA, sed ne povis resti membroj.

La Volontula Servo de UEA serĉas kandidat(in)on por

DIREKTORO DE LA NOVJORKA OFICEJO DE UEA

La direktoro havas ĝeneralan respondecon por administrado de la Oficejo, kunordigo de lokaj volontuloj kaj kutimaj kontaktoj kun Unuiĝintaj Nacioj.

Kvalifikoj bezonataj inkluzivas administran kapablon kaj konojn pri oficejaj operacioj, kompletan regon de Esperanto kaj bonan scipovon de la angla lingvo.

Minimuma restado: ses monatoj.

La direktoro ricevos apartamenton en Novjorko kaj pagon de vojaĝkostoj al kaj de Usono. Li/ŝi respondecos pri ĉiuj aliaj kostoj. Kandidatigojn kaj sinproponojn sendu al la Administra Estraro, Universala Esperanto-Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, Usono.

las al bolanta kaldrono, ol al fermita klubo en kiu nenio okazas de jaro al jaro. Jen kelkaj ekzemploj:

Nur la "perdo" de la individuaj membroj en unu lando dum 1982 superas la suman "perdon" de la tuta Asocio en tiu membrokategorio — Brazilo pasintjare perdis 181 individuajn membrojn, kompare kun 1981. Vi ne surpriziĝos konstati, ke membrojn perdis ankaŭ Argentino (51), Ĉilio (8), Meksikio (5), Peruo (9) — pli-malpli la tuta Sud-Ameriko. Kial? Nu, ĉar la Universala Kongreso ne okazis denove en tiu kontinento (kaj malaperis "provizoraj" membriĝoj pro la UK), ĉar reaperis la malnovaj transpagaj problemoj, ĉar la inflacio tiel galopis, ke la kotizoj fariĝis tro altaj por la sudamerikanoj, por samtempe porti bagatelajn kontribuojn al la kaso de UEA mem. Gravan perdon de la individua membraro la Asocio notis ankaŭ en Irano (64) kaj Pollando (45). Ĉu necesas klarigi kial? Ekstermovadaj faktoroj funde influas ankaŭ la movadajn evoluojn, kaj ni ne povas atendi, ke nia membraro en Irano kresku, kiam la lando estas en milito, aŭ en Pollando, kiu estas en profunda ekonomia kaj socia krizo. La prezidanto de UEA klarigas (vidu nian januaran numeron, p.2) en sia novjara mesaĝo, ke la Asocio ne povas eskapi la tutmondan inflacion, kvankam ni ja kapablas prokrasti ĝiajn efikojn dum kelkaj jaroj.

Kie kreskis la individua membraro dum 1982? En Belgio, kompreneble pro la Kongreso tie, UEA "gajnis" 51 membrojn. Kresko okazis ankaŭ en Britio (35), Francio (18), Hispanio (34), Israelo (10), Nederlando (17), Portugalio (8) ktp.

Simila drameco konstateblas ankaŭ ĉe la nombroj de la aligitaj membroj: rekorde perdis Belgio (250),

Argentino (77), FR Germanio (40), Hispanio (32), kaj — aliflanke — gajnis: Jugoslavio (214), Aŭstralio (38), Brazilo (70), Britio (55), Ĉeĥoslovakio (59), Germana DR (182), Italio (152) kaj Svedio (157). Inter la gajnintoj necesas menci ankaŭ la junularan sektion TEJO, kiu en 1982 havis 327 junajn aligitajn membrojn pli ol en 1981.

Ni supozeble konvinkis vin, ke ene de difinita jaro okazas multaj evoluoj, kiujn la finaj membronombroj neniel malkaŝas. Nur se ni deĉifras tiujn sekretojn, se ni atente studas, kial en difinita lando la membronombro kreskis aŭ malkreskis, ni povas fari ion efikan por altigi ankaŭ la sumajn nombrojn pri la membraro de la Asocio. La Estraro ĵus faris tian

paŝon kaj decidis per subvencio helpi la remembrigon de la "perditaj" membroj en Irano, pri kiu ni en nia venontjara statistiko do notos "kreskon". Intervenon similan al tiu de la Estraro povus eble fari ankaŭ multaj unuopaj membroj de la Asocio per almenaŭ eta kontribuo al Fondaĵo Canuto, tiu speciala "lando" de solidareco, kiu ne vidiĝas en niaj statistikoj, kvankam ĝi membrigas centojn da homoj el la mondpartoj kun pagaj aŭ transpagaj problemoj. Se Fondaĵo Canuto disponus pri kelkdek mil guldenoj ĉi-jare, estus facile altigi per mil la individuan membraron de UEA ĝis la venonta jaro. Ne mankas kandidatoj por la membreco sed mono por membrigi ilin.

S. Milojević

INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE UEA

La unuaj ekzamenoj okazos dum la UK en Budapeŝto

Dum la 68a Universala Kongreso en Budapeŝto, UEA unuafoje ofertas la eblecon fari elementan kaj mezan ekzamenojn pri Esperanto, por tiuj kongresanoj, kiuj deziras posedi ateston pri sia lingva kapablo. Kialoj por tiaj deziroj estas diversaj. Unuj volas havi plian dokumenton por eventuala prezento al sia labordonanto; aliaj deziras konfirmon pri sia lingva kapablo, por ricevi la rajton instrui la Internacian Lingvon en privataj aŭ ŝtataj institucioj de sia lando; pliaj simple scivolas pri la stato de sia lingvorego.

En certa nombro da landoj ekzistas instancoj, kiuj ekzamenas kaj provizas atestojn. Tamen, en multaj landoj ne estas tiel. Superrigardo pri tio estas preparata de d-ro Werner Bormann por la Akademio de Esperanto. La ekzamenoj de UEA estas intencitaj ĉefe, sed ne nur, por la landoj sen ekzamena servo pri Esperanto.

Koncize pri la evoluo: Dum la 66a UK en Brazilo, en 1981, la Estraro de UEA pritraktis la eblecojn okazigi krom la ĝisnunan Internacian Ekzamenon ankaŭ elementajn kaj mezajn ekzamenojn. La estrarano pri kulturo kaj edukado, Baldur Ragnarsson, ricevis la komision gvidi la projekton. Por la UK en Antverpeno pasintjare, UEA aprobis proponon de Germana Esperanto-Instituto (GEI) aranĝi meznivelan ekzamenon dum la Kongreso. Ekzamenaj komisionoj de GEI provizis sian "Unulingvan Ekzamenon pri Lingva Kapableco", kiun sukcese partoprenis 13 kandidatoj. La eksperimento pruvis, ke ekzistas intereso pri tiaj ekzamenoj. Samtempe s-ro Ragnarsson prezentis sian malneton de nova regularo por la ekzamenoj de Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) kaj ricevis la aprobon de la Komitato de UEA. En decembro 1982, la Estraro nomis prezidanton kaj

sekretarion de IEK kaj tiel definitivigis ĝiajn konsiston kaj starigon.

La intenco de la nova prezidanto de IEK, Gerald Tucker (FR Germanio), estas, ke la ekzamenoj fariĝu tradicia ero de la Universalaj Kongresoj. Dank'al la cirkonstancoj, la unuaj elementaj kaj mezaj ekzamenoj de UEA okazos dum la 68a UK en la hungara ĉefurbo.

Postuloj de la ekzamenoj: Ambaŭ ekzamenoj havos skriban kaj parolan partojn.

Skriba parto: La kandidato ricevas simplan tekston por legi kaj liston da demandoj pri tiu teksto. Per siaj respondoj la kandidato pruvu sian kapablon kompreni la tekston kaj la demandojn, kaj doni konvenajn, sencoplenajn respondojn. Per la plenigo de vakaj lokoj en aro da frazoj, la kandidato demonstru sian kapablon percepti kaj kompletigi internacilingvajn strukturojn.

Skribante mallongan, zorge kompilitan diktatan tekston, la kandidato montru sian regon de la Esperanto-skribmaniero. Per mallonga eseo pri donita temo, la kandidato ebligu prijuĝon de sia kapablo prezenti faktojn, argumentojn kaj opiniojn en simpla sed korekta Esperanto.

Parola parto: Orientiĝante laŭ provizita bildoserio, la kandidato pruvu sian kapablon internacilingve priskribi observatan scenon aŭ situacion. En konversacio, bazita sur demandoj de la ekzamenantoj, la kandidato montru sian kapablon doni petitajn informojn.

Diferencigo laŭ nivelo: Fundamente, la strukturo de ambaŭ ekzamenoj estas la sama. Tial necesas diferencigi ilin laŭ enhavo kaj amplekso de la materialo. Tiucele la prezidanto de IEK prezentis al siaj kunla-



Kongresano koncentriĝas super siaj paperoj: Ekde la 68a UK oni povos koncentriĝi super ekzamenaj taskoj dum la kongresa semajno. (Foto: J. Osap)

borantoj jenajn precizigojn de la ekzamena regularo:

1. La elementa ekzameno ebligu la konstaton, ĉu la kandidato scipovas skribi kaj paroli komuniki en Esperanto en tipaj kongresaj cirkonstancoj.
2. La meza ekzameno ebligu la konstaton, ĉu la kandidato scipovas skribi kaj paroli komuniki en Esperanto en ĝeneralaj (ankaŭ eksterkongresaj) cirkonstancoj.

Grava principo por la elementa ekzameno estas la evito de la kunmetitaj tempoj kaj de pli komplikaj akuzativaj formoj (ekzemple, kun adverbo). Jenaj ĝeneralaj principoj regas la deziratan stilon por ambaŭ ekzamenspecoj: stilo sobra, evitanta konfuzajn vortludojn, tro longajn vortojn kaj frazojn, neestablitajn neologismojn kaj naciismojn, fakajn kaj tro naci-specialajn terminojn kaj esprimojn.

Organizo de la ekzamenoj: IEK ellaboras la ekzamenan materialon, kaj la administraj instancoj de UEA presas kaj disponigas ĝin al la sekretario de IEK, por dissendo al la kandidatoj. Tiel, kie la ekzameno okazas, lokaj respondeculoj prizorgas la ekzamenadon kaj ĝian administradon. Normale, oni

anoncos sian deziron ekzameniĝi ankaŭ al tiuj lokaj respondeculoj. Tamen, ĉi tiun unuan fojon, ĉar la ekzameno okazos dum UK, interesitoj bonvolu anonciĝi ĉe la sekretario de IEK: s-ro Douglas F. Coates, 9 Chequerfield Avenue, Fortefract, West Yorkshire, WF8 2TB, Britio.

Ekzamena kotizo: Laŭ la nova ekzamena regularo, la Estraro de UEA fiksos (verŝajne dum sia kunsido en aprilo ĉi-jare) la pagendajn ekzamenajn kotizojn. Interesitoj bonvolu kalkuli, ke temos pri la sumo de ĉ. 30 guldenoj.

Tempo: La ekzamenoj en Budapeŝto okazos dum du tagoj antaŭtagmeze, plej verŝajne paralele kun la ekskursoj (pri kio konsultu la kongresan programon). La kandidatoj komune prezentiĝos ĉe la skriba parto dum la unua ekzamentago, kaj ĉe la parola parto unu post la alia la duan tagon.

Pliaj informoj: Pliajn detalojn pri la ekzamenoj bonvolu peti ĉe la prezidanto de IEK: s-ro Gerald Tucker, Lilienthalstr. 3, D-8900 Augsburg, FR Germanio; telefono: (0821) 574231.

(Laŭ materialo liverita de G. Tucker)

Regularo pri la Fondaĵo Antoni Grabowski

Art. 1: La Fondaĵo Antoni Grabowski havas la celon subteni la Esperantan kulturon kaj la partoprenon en tiu kulturo de ĉi-sube difinitaj malhelpatoj.

Art. 2: La kapitalo de la Fondaĵo estas investita en banko je kiel eble plej alta rentumo, en dolara konto.

Art. 3: El la kapitalo de la Fondaĵo estas prenita ĉiujare la sumo de \$US 1250, por disdono de tri premioj konsistantaj el \$750; \$350 kaj \$150, pro meritoj por la Esperanta kulturo.

Art. 4: Post subtraho de eventualaj administraj kostoj, la rento estas uzata ĉiujare jene:

25% aldoniĝas al la kapitalo;

15% estas donitaj al la Fondaĵo Adopta Kaso de la Universalaj Kongresoj por ebligi la partoprenon de kongresanoj el netranspagipovaj landoj;

10% estas donitaj al Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj por ĝia agado;

35% estas donitaj al kultura eldonejo aŭ alia kultura instanco de la Esperanto-movado, laŭ elekto de la Estraro de UEA;


15% estas donitaj al Esperanto-revuo de kultura aŭ scienca karaktero, laŭ elekto de la Estraro de UEA.

Art. 5: Por aljuĝo de la premioj menciitaj en Art.3 kaj por rekomendo al la Estraro pri la subvencioj menciitaj en Art.4 servas aparta juĝkomisiono, nomita de la Estraro de UEA. La komisiono konsistas el tri membroj, el kiuj unu servas kiel prezidanto kaj unu kiel sekretario de la komisiono. Ĉiu membro havas anstataŭanton, nomitan de la Estraro de UEA.

Art. 6: La komisiono estas tute libera en sia taksado pri kulturaj meritoj. Ĝi rajtas ricevi alvokojn kaj rekomendojn por konsidero. Ĝi rajtas instigi al grava kultura laboro per anonco de difinita konkurso en difinita jaro pri la premioj menciitaj en la Art.3. Ĝi rajtas subteni per premio daŭrantan kulturlaboron.

Art. 7: Ĉiuj membroj de la juĝkomisiono kolektas informojn pri konsiderindaj kulturaj meritoj. La prezidanto de la komisiono respondecas pri la efektivigo de la juĝlaboro. La sekretario zorgas pri la diskonigo de la Fondaĵo kaj pri la anoncado de la premioj. La sekretario ankaŭ faras ĉiujaran raporton pri la laboro de la komisiono, kiun li sendas, post aprobo de la prezidanto, al la Estraro de UEA, antaŭ la 15a de decembro.


ĈI-JARA KONGRESLANDO



Hungario kaj ĝia ĉefurbo

Hungario estas verŝajne ne multe konata lando por la ĝenerala publiko tutmonde, sed certe ĝi akiris pli da konateco inter esperantistoj: pro la eŭropa senparenceco de la hungara lingvo, Esperanto ĉiam havis fekundan grundon en tiu ĉi lando. Jam komence de la jarcento la hungara presisto Paŭlo Lengyel aperis en la internacia areno, kiam li certigis la aperadon de la revuo *Lingvo Internacia* inter 1900 kaj 1904. Dum la intermilita periodo alportis internacian renomon por la hungara Esperanto-movado Julio Baghy (1891-1967) kaj Kolomano Kaloscay (1891-1976), kaj ĝenerale la Budapeŝta Skolo. La movada kaj kultura aktivado de hungaraj esperantistoj ankaŭ dum la lastaj jardekoj estas daŭre signifa.

Budapeŝto, la ĉi-jara kongresurbo ne estas nur ĉefurbo de Hungario, sed ankaŭ ĝia centro el ĉiuj vidpunktoj: ĝi havas du milionojn da loĝantoj, kio signifas, ke ĉi tie vivas 20 % de la landa loĝantaro. La urbo kuŝas sur ambaŭ bordoj de la rivero Danubo, kaj tiamaniere ĝi kunigas en si la du ĉefajn karakterizajn tipojn de la hungara pejzaĝo: mildajn montetojn (okcidente) kaj ebenaĵon (oriente).



Multo vidinda en Hungario: Subĉiela muzeo, malnova strato en Budapeŝto kaj interna dekoro en la Parlamentejo

La okcidenta parto de la urbo nomiĝas **Buda**: ĉi tie troviĝas la ĉefaj historiaj memoraĵoj de la urbo, ĉar pro la turka okupado (1526-1699) ne multo postrestis el la mezepoka hungara arkitekturo. Tamen, la rekonstruita reĝa palaco, la gotika Matias-preĝejo, la ŝtonpunta Fiŝista Citadelo kaj la barokaj stratoj prezentas unike historian atmosferon. Ŝatata promenloko por budapeŝtanoj estas Gerharda Monto, de sur kies pinto (per 20-minuta promeno atingebla) oni povas ĝui la panoramon de la tuta urbo.

Pest estas la orienta parto: pli granda kaj pli nova ol Buda. Ĝian fizionomion difinas la arkitektura stilo, kiun germanoj nomas *Jugendstil*, francoj *art nouveau*. La ĉefa vidindaĵo de Pest estas la novgotika Parlamentejo, kaj la tuta interna urbo, kiun ĉirkaŭringas Granda Bulvaroj, borderita de domoj, kiuj plejparte konstruiĝis fine de la pasinta jarcento. En Pest troviĝas ankaŭ la impona Sporthalo "Budapest", kiu servos kiel kongresejo de la 68a UK. La du urbopartojn kunligas belaj pontoj, modernaj kaj klasikaj, solide modestaj kaj plaĉivole mondumaj. Aparte menciindas la riĉeco de Budapeŝto je sanigaj termoakvoj, kiujn oni povas ĝui en bele konstruitaj termobanejoj.

Budapeŝto servas ankaŭ kiel bonega elirpunkto por ĉiaj ekskursoj tra la lando. Veturante al la okcidento, oni povas travagi la mildajn montetojn de Transdanubio, kiu jam ravis ankaŭ la romianojn: ili fondis ĉi tie provincon kun la nomo Panonio. Meze de

Transdanubio, je ĉ. 100-kilometra distanco de Budapeŝto, situas eble la ĉefa turisma allogaĵo de Hungario, la lago Balatono.

Forlasante Budapeŝton norden, oni povas traveturi pitoreskajn urbetojn kaj vilaĝojn ĉe Danubo. Tie situas ankaŭ Esztergom, kiu gastigos ĉi-jare la Konferencon de KELI. Ŝanĝante la direkton al nordoriento, oni jam atingas la arbaran-montaran regionon de Hungario, kvankam kun montoj nur ĝis 800-metraj, tamen havantaj perfektan etoson. Meritas apartan atenton la departemento Nógrád, kie popolkostumoj eĉ nun ne tute malaperis el la uzo.

Se elveturante el Budapeŝto oni elektas la orientan direkton, post kelkaj dekoj da kilometroj oni atingos la orientan ebenaĵon, kiun la nacia poeto Sándor Petőfi (1823-1849) levis por hungaroj ĝis la simbolo de libero. Je ĉ. 200 kilometroj de Budapeŝto situas la Nacia Parko Hortobágy (hortobadj), pejzaĝo stepa, konservinta sian iaman fizionomion. Rande de Hortobágy situas Debrecen, urbo kun fortaj kalvinismaj tradicioj, kiu akceptos ĉi-jare la Internacian Junularan Kongreson de TEJO.

Hungario estas lando malgranda, sekve ĝi ne povis eviti la efikojn de la krizo en la internacia ekonomio. Tamen, ĝis nun ĝi konservis sian pagkapablon, orde repagas siajn ŝuldojn, sen fari signifajn limigojn en la enlanda konsumado. Kompreneble, ankaŭ hungaroj ne vivas en paradiza stato, sed mankas en la lando



Ŝildo de la restoracio „Greka Kruĉo” en la pitoreska urbeto Szentendre, apud Budapeŝto

sociaj streĉitecoj, oni ne konas rajdantan inflacion, senlaborecon, limigojn de benzino, mankon de varoj; la oferto de nutraĵoj estas aparte ampleksa – hungaroj ja tre ŝatas manĝi. La prezoj laŭ okcidentaj konceptoj estas tre modestaj: por unu guldeno oni povas 15-foje uzi tramon aŭ eniri tri muzeojn, por kvar guldenoj oni povas tagmanĝi en modesta restoracio; teatra bileto kostas 3-4 guldenojn...

Hungaroj ofte renkontas kaj ŝatas eksterlandanojn: ĉiujare pli ol dek milionoj da personoj vizitas Hungarion, kaj ĉ. 6 milionoj da hungaroj vojaĝas eksterlanden. La partoprenantaron de la 68a UK akceptos gastamaj homoj, ne nur en la akceptejo, sed en la tuta lando.

Vilmos Benzcik

Spertoj pri la zagreba metodo

Antaŭ tri jaroj en *Esperanto* (n-ro de januaro 1980, p.7) aperis artikolo de la sama aŭtoro, pri la unuaj eksperimentoj rilate novan instrumetodon en Jugoslavio, kun invito peti tiun instrumaterialon. Temis pri lernolibro (tiam ĝia 2a eldono), kiun ellaboris aŭtora grupo el Zagrebo. Tiu artikolo poste estis represita en kelkaj aliaj Esperanto-gazetoj (eĉ aperis kelkaj nacilingvaj tradukoj de ĝi). El ĉio ĉi sekvis 358 leteroj, ĉefe de instruistoj kaj instruantoj el 43 landoj de ĉiuj kontinentoj.

Internacia Kultura Servo (IKS) — eldonisto de tiu instrumaterialo — dissendis al preskaŭ ĉiuj petintoj la lernolibron (ĝia 3a eldono aperis fine de 1981) kaj la akompanan instrukciaron. Ni petis, ke oni skribu pri siaj rimarkoj, precipe se oni aplikos la metodon.

Krome, en 1981 kaj 1982 ni dissendis al pli ol duono de tiuj petintoj enketilon, per kiu ni volis informi pri la aplikado de la metodo kaj ankaŭ esplori pli vaste la nunan staton de la Esperanto-instruado ĝenerale. Ĉio ĉi aldoniĝis al la fakto, ke la aŭtoro de ĉi tiu teksto jam en 1979 faris apartan esploron pri la vortkaj morfem-frekvencoj en la parolata Esperanto. Temis pri tio, ke dum la 64a UK en Lucerno kaj la 35a TEJO-kongreso en Austerlitz (Nederlando) estis sonbende registritaj multaj ĉiutagaj diskutoj, paroladoj kaj konversacioj, por ke poste tiu materialo estu komputile prilaborita. Provrezultoj de tiu esploro estis konataj kaj parte aplikitaj jam en la 3a eldono de la lernolibro.

La sama aŭtora grupo (S. Ŝtimec, I. Ŝpoljarec, R. Imbert, D. Sović kaj Z. Tišljarić), plifortigita de Tibor Sekelj, ellaboris la kvaran, plibonigitan eldonon de la lernolibro. En ĝi oni plene aplikis la rezultojn de la frekvencoesploro, kaj la nova kunaŭtoro donis pli belan veston al la stilaj ekzercoj.

Intertempe ankaŭ UEA kaj TEJO komencis interesi pri la minimuma vortprovizo, kaj eldonis la t.n. facilan numeron de *Esperanto* (novembro 1981), por ekde ĉi tiu jaro tiurilate transformi la revuon de TEJO, *Kontakto*. Krome, UEA ellaboris programon por baza internacia ekzameno, kies vortprovizo esence baziĝos ankaŭ sur la zagrebaj esploroj.

Ĉar la instruado laŭ la nova metodo produktis ĉiam pli kaj pli da esperantistoj, kiuj kapablis uzi la lingvon, sed kun limigita vortprovizo, montriĝis necese zorgi ankaŭ pri legaĵoj por ili, pri libroj, kiujn ili tuj povus legi. Tial IKS komisiis al Roger Imbert (Zagrebo) adapti al facila Esperanto konatan kaj interesan romanon. Tiel estiĝis *La sentimulo* (vidu

recenzon en ĉi tiu revuo de novembro 1982) de J.F. Cooper, kiun Imbert mallongigis kaj rerakontis per la vorttrezoro permesebla en la metodo (ĉ. 450 radikoj). Ekinteresiĝis pri la afero ankaŭ Claude Piron, kiu mem verkis jam tri originalajn romanetojn en facila Esperanto. Jen, do, la tuta "fabriko" ekfunkciis.

Ke la laboro de la zagreba grupo ne havis nur lokan karakteron montras ankaŭ la fakto, ke la menciita lernolibreto estis jam tradukita-adaptita (laŭ la 2a kaj 3a eldonoj) al 14 lingvoj; ĝi aperis en presita aŭ multobligita formo en 9 lingvoj: kroatserba, made-dona, slovena, germana, franca, malta, kataluna, itala kaj kirunda. Tradukoj pretas ankaŭ en la lingvoj: norvega, angla, nederlanda, njanja kaj bembua. Oni interesiĝas pri adaptoj en la portugala, kastilia, pola, hungara, bulgara, rusa kaj sveda. Tia interesiĝo — almenaŭ laŭ nia scio — ne estas ĝis nun konata pri iu ajn alia Esperanto-lernolibro. Unu el la kialoj de tiu interesiĝo devus esti ankaŭ la fakto, ke la lernoli-

Surbaze de la tuta korespondado ĉi-rilata, ni kolektis abundon da informoj pri la nuna stato de la Esperanto-instruado ĝenerale. Jen kelkaj konkludoj:

Pere de la enketilo kiun resendis 31 demanditoj, eblas ricevi preskaŭ tutecan bildon pri la nombro kaj konsisto de la kursanoj en kelkaj landoj — Usono, Israelo, Malto, Francio kaj Jugoslavio. Partajn respondojn ni havis pri Hispanio, Finnlando, Aŭstrio, FR Germanio, Italio, Soveta Unio kaj Svedio. Baze, el tio konkludeblas, ke en la 12 menciitaj landoj ĉiujare lernas Esperanton minimume 9 000, kaj maksimume 20 000 personoj. Surpriza fakto estas, ke inter 50 kaj 90 procentoj (meze 75 %) de tiuj personoj estas gejunuloj. Tio plene malkoincidas kun la aĝstrukturo de UEA. Kie malaperas tiuj amasoj de gejunuloj?

Se ni provas el la ĉi-supraj informoj fari pliajn konkludojn, ni povas supozi, ke ĉiujare en la mondo la lingvon lernas amaso de 50 ĝis 100 mil personoj (alkalkulu nur la 20 000 ĉinojn, plurmilojn da bulga-



Tri membroj de la zagreba lernolibra teamo (de maldekstre): Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec kaj Zlatko Tišljär

bro maksimume eluzas la avantaĝojn de Esperanto mem kaj evitas esti kopio de nacilingvaj lernolibroj de fremdaj lingvoj.

En Jugoslavio ĉio ĉi provokis sufiĉe vigran nacilingvan informadon. Pri la metodo skribis kelkaj grandaj gazetoj, eĉ televido filmis kvaronhoran elsendon por sia rubriko „Scienco kaj ni”.

Se oni konsideras, ke IKS planas daŭrigi la libroserion „Facila Esperanto” (en kiu aperis *La sentimulo*), ke verŝajne la programo por la internacia baza ekzameno baziĝos sur la vortprovizo de la metodo, ke regule aperados *Kontakto* kun facilaj legaĵoj, oni povas supozi, ke ĉi tiu lernometodo plue populariĝos. Tian atendon apogas ankaŭ la fakto, ke la metodo ne estas farita surbaze de teoria supozo, sed — ĉefe — pere de konstantaj apliko kaj praktikado. La aŭtoroj post ĉiu eldono atente sekvis la rimarkojn de la uzantaj instruistoj kaj mem gvidis plurajn kursojn por eksperimenti pri la metodo. Montriĝis, ke oni senprobleme povas instrui tiun bazon de la lingvo dum du semajnoj (du horoj tage) aŭ dum du semajnfinoj en grupoj ĝis 10-personaj.

roj, poloj, kubanoj, brazilanoj, irananoj, kies respondojn ni ne havas). Kion faras niaj landaj asocioj kaj UEA por organizi tiujn amasojn? Ŝajne, nenion. Tial la amasoj daŭre elfalas el la cirklo, kaj ilin ĉiujare anstataŭas novaj dekmiloj, malaperontaj.

El la menciita amaso de 358 leteroj, ni eksciis ankaŭ aliajn interesajn informojn. Tiel ni ricevis la impreson, ke la instruado de Esperanto plej serioze estas traktata en Svedio, Francio, Hispanio, FR Germanio kaj Soveta Unio. El tiuj landoj venis plej multaj respondoj de instruistoj kaj instruantoj. Estis surprizo konstati, ke el kelkaj landoj konataj pro la amasa Esperanto-instruado (Pollando, Hungario, Bulgario) venis tre malmultaj informpetoj. Aliflanke, ni ricevis multajn leterojn el ekstereŭropaj landoj: preskaŭ ne ekzistas lando en Sud-Ameriko, el kiu ne venis pluraj petoj; skribis ankaŭ instruantoj el Tajlando, Kuvajto kaj Vjetnamio. Fine, estas stranga la fakto, ke la faka organizaĵo — Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj — montris nenian intereson pri nia metodo kaj spertoj pri ĝi.

Zlatko Tišljär

Vizito de tri japaninoj

Jam de ĉ. du jaroj, en Tokio ekzistas (aŭ devus ekzisti) tute speciala branĉo de la t.n. Regiona Agado de UEA. La ideo estis, ke en Japanio, kiu tradicie havas bone organizitan Esperanto-movadon, kreiĝu aparta grupo, kiu flegus la rilatojn kun unuopaj esperantistoj kaj malfortaj landaj organizaĵoj en la tuta azia kontinento. Ial ne kreiĝis tiu grupo (ĉu Japana Esperanto-Instituto montris sufiĉe da intereso pri ĝi?), sed la laboro ekfunkciis, unuavice dank' al s-ino Kazuko Kikusima, kiu nun havas apenaŭ malpli da kontaktoj en Azio, ol Hans Bakker havas en Afriko. Fakte, Kikusima (pli konata kiel "Krizantemo") disvolvis tiel viglan agadon, ke apenaŭ kredeblas, ke ĉion faras unu aktivulino, aldone al siaj aliaj movadaj kaj profesiaj taskoj. Jen bela ekzemplo de la sindediĉo de Kikusima al sia nova tasko:


Dum dek tagoj, de la 29a de decembro 1982 ĝis la 7a de januaro 1983, tri japanaj esperantistinoj iris viziti plurajn Esperanto-grupojn en Hinda Unio. Temis kompreneble pri Kikusima mem kaj pri du junulinoj: Yûko Yasiro el Tokio kaj Tomoko Nagata el Osaka. Ili mem pagis sian vojaĝon. Japana Esperanto-Instituto, Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj kaj Nagoja Esperanto-Centro donacis multajn librojn (por pli ol mil guldenoj), kiujn la tri vizitantinoj kunportis donace al Hinda Unio. Iris donace tien ankaŭ tajpilo kun Esperanta klavaro.

La eta japana "misio de bona volo" vizitis la urbojn Nova Delhio, Kalkato kaj Viĵajavado (kie pasintjare okazis la unua kongreso de hindaj esperantistoj). Ne nur ke la vizitanta grupeto ĉie renkontis esperantistojn, sed la tri japaninoj ĉie loĝis en hindaj familioj kaj tiel povis ne nur plene eluzi la tempon por diskuti la lokajn movadajn demandojn sed ankaŭ pli bone kaj pli intime konatiĝi kun la vivo de la gastigantoj.

En Nova Delhio pri la vizitantoj zorgis la malnova hinda aktivulo B.R. Tulsyani, sed tie troviĝis ankaŭ la juna svedo Per Sjödin, la turko Enver Yalçın kaj la iranano Hesmat Faraĝi, tiel ke la renkontiĝo fariĝis vere internacia. En Kalkato la restadon prizorgis S.S. Pal. Tie la tri japanaj vizitantinoj partoprenis en la Zamenhofa Festo kaj spektis la pupteatraĵon *Malsata ŝtono* de R. Tagor, en Esperanto, kiun en la UK en Antverpeno prezentis la hinda pupteatro. La Zamenhofan Feston en Kalkato ĉeestis ĉ. 50 geesperantistoj. En la tria urbo, Viĵajavado, ne temis nur pri la renkontiĝo kaj diskutoj kun d-ro P.V. Ranganayakulu, organizinto de la pasintjara kongreso, sed tien venis ankaŭ ges-roj Nath el Bangaloro (s-ro Nath estas la

prezidanto de Federacio Esperanto de Bharato) kaj kolektiĝis dudeko da aliaj lokaj esperantistoj.

Ĉi tiu rapida "ekspedicio" de Kikusima al unu el la landoj kun kiuj ŝi prizorgas la kontaktojn certe helpas al ŝi estonte pli efike subteni la esperantistaron en Hinda Unio. Ĝi eventuale ankaŭ instigos — tiel devus esti! — aliajn esperantistojn en Japanio serĉi manieron por helpi la laboron kiun nome de UEA faras tiu verva tokia aktivulino. Adreso: K. Kikusima, Sinzyuku P.O. Kesto 233, Tokio, 160-91 Japanio.



"Krizantemo" (tute dekstre sur la plej supra foto) kun siaj hindaj geamikoj

Profite al specialistoj

Proverboj de Marko Zamenhof kaj de Lazaro Zamenhof; (13 155 proverboj). Kompilis A. Holzhaus (1892-1982). Helsinki: Fondumo Esperanto, 1980. 704 p. 21 cm. ISBN 951 9005 47 1. Prezo: 60,90 gld.

Tiu dika, verde broŝurita volumo enhavas kvin librojn. Laŭvice ili estas: 1) Marko Zamenhof: rusa (p. 11-17), franca (p. 43-65) kaj germana (p. 71-96) frazeologioj. Ĝi aperis en 1873. 2) Marko Zamenhof: rusa (p. 108-131), pola (p. 135-159), franca (p. 163-181), germana (p. 187-207) kaj Esperanta (p. 215-297) frazeologioj, krome, speciala pribesta proverbaro en Esperanto (p. 298-304) kaj alfabeto indekso (p. 305-327). Ĝi aperis en la jaroj 1905-1907. 3) Marko Zamenhof: Kompara rusa-franca-germana frazeologio (p. 335-459). Ĝi aperis en 1875. 4) Marko Zamenhof: Kompara rusa-pola-franca-germana frazeologio; unua kajero (p. 461-496); dua kajero (p. 497-528); tria kajero kun aldono de proverbaro Esperanta (p. 529-600). Ĝi aperis en 1905. 5) Marko Zamenhof: Proverbaro Esperanta, aranĝita de L.L. Zamenhof laŭ la verko de sia patro (p. 601-680) kun alfabeto registro (p. 681-688). Ĝi aperis en 1910. Sekvas ankoraŭ kelkaj paĝoj (p. 689-704), kiuj enhavas anoncojn el la epoko kaj du manskribe kaj tajpote reproduktitajn leterojn de L.L. Zamenhof: al Johann Martin Schleyer de 1887 11 27 kaj al Emanuel Kubasek de 1914 04 13.

Pri ĉio ĉi, kion la recenzanto pene ekstraktis el la libro, ja devus informi enhava indekso. Sed tiu mankas. Estas malfacile sin orienti en la libro. Stranga estas la insistado de Adolf Holzhaus pri la fakto, ke li transskribis la proverbojn el la unuopaj partoj de la libro en alfabeto ordo kaj ricevis ĉiuforte tiom aŭ tiom da proverboj, entute 13 155. Ja troviĝas ne malmultaj el la proverboj en pli ol nur unu parto, ili do estas kalkulitaj almenaŭ dufoje, se ne plurfoje. Kian sencon havas tiu statistiko? Mi ne povas vidi en ĝi ion alian ol pruvon de la fervora laboremo de la kompilinto kaj mi demandas min, ĉu ne estus pli meritplene eldoni la libron kiel faksimilojn, fotoreprezo. La kvinan libron Adolf Holzhaus ne alfabetigis. En ĝi la Esperantaj proverboj sekvas la ordon, laŭ kiu la respondaj rusaj proverboj estas aranĝitaj. Ilian Esperantan alfabetigon jam efektivigis Camille Rogister (kun helpo de A. Caubel kaj G. Waringhien) en *Proverbaro Esperanta* (J. Régulo 1961, dua eldono 1974). Pri tiu libro Holzhaus lakone diras: "En la libro estas

eraroj." Nu, ankaŭ en la libro de Adolf Holzhaus estas eraroj. Tamen tio ŝajnas al mi ĉe tia verko preskaŭ neevitebla, certe pardonebla. Por la esperantistoj ja sufiĉas la proverbaro prizorgita de Rogister. La tre ampleksan, tre sciencon, kaj tamen iom konfuze montran verkon de Adolf Holzhaus supozeble kun profito uzos nur specialistoj.

Rikardo Ŝulco (FR Germanio)

Membriografio de kuraĝa homo

Mia vivo, de Trifon Ĥristovski (1904-1944). El la bulgara trad. Nikola Aleksiev. Red. A. Grigorov. Sofia: Sofia Pres, 1981. 179 p. 19 cm. Prezo: 6,60 guldenoj.

"La ĉefaĵo estas ne simple vivi, sed vivi sencoplene; eĉ duonkadavro, mi donos pruvojn al la ceteraj homoj, ke mi vivas sencoplene." Tiel en letero al N. Aleksiev skribis Ĥristovski en 1942, du jarojn antaŭ sia morto. En sia membriografio, la aŭtoro — sen multa beletra ornamo, sed des pli aŭtente — skizas bildon de homo terure trafita de malforteco korpa (sesmonata li paralizigis pro poliomjelito; sanaj estis nur la kapo kaj la maldekstra mano) sed kun kia interna persistemo!

Formalan lernejan klerigadon li ne povis sekvi regule, tamen lia soifego je legado ebligis al li akiri vastajn sciojn. Edukate (aŭ prefere: kreskinte) en malmoderna vilaĝo, li kontaktigis kun du movadoj: esperantismo kaj komunismo. Liaj Esperanto-korespondadoj foje superis la duonon de la tuta poŝto de la vilaĝo.

Fone de ĉi tiu vivo bildiĝas (por ne-bulgaraj legantoj sufiĉe nekutima) vilaĝanaro. Regis tie speco de kristanismo, kiu ŝajne deformigis al ia magia afero: pro lia paralizigo, lia avinjo kulpigas preskaŭ unuspire dion kaj drakon (ĉu simbolo por diablo?) kaj la profeton Elija! Belegas kiel mokbildo la priskribo de la pastroedzino, du-seĝ-dika, pipfumanta (paĝ.27). La ade ripetiĝantaj malriĉo, sufero, provoj riĉiĝi (eĉ migrante ekstereŭropon!) klare montras la tiutempan kaj tiavilaĝan vivnivelon. Kortuŝe estas legi pri la morto de eta fratino, por kies prizorgo dum malsano mono mankis. Malriĉula mizero, kelkfoje memori-ganta min pri Dickens (kvankam ne stile).

Mi devas bedaŭri, ke — supozeble sub slavlingva influo — mankas plurfoje en la frazoj la subjekto, se (ĝi) estas (nur?) pronomo. Ankaŭ rilatpronomoj prezentis ŝajne malfacilon: foje rezultas iom tordita frazkonstruo. Tamen, ĝenerale tio ne tro ĝenas dum

la legado: la enhavo estas pli forta. Longa vico da notoj klarigas bulgaraĵojn kaj ne ĉiutagajn vortojn. Erarotabelo ne senkaŭze estas aldonita, sed bona! Entute indas ekkoni per ĉi tiu verko ties aŭtoron kaj lian medion.

Gerrit Berveling (Nederlando)

Eta "Homa komedio"

Hieraŭ — hodiaŭ — morgaŭ; Noveloj, de Bernard Golden (1925-). Antverpeno / La Laguna: TK / Stafeto, 1982. 96 p. 21 cm. ISBN 90 6336 022 3. Prezo: 12,00 gld.

Stranga frateco — aŭ tute ne stranga, se vi preferas — kunligas la homojn, ne nur tra malsamaj fizikaj karakterizoj, kutimoj, kredoj, opinioj, sed tra spacoj kaj tempoj, tiel ke la reagoj de la homa estaĵo — brutnivela aŭ altciviliza — restas la samaj. Ni homoj: de kie venantaj? Kien irantaj? Ni, kiuj tamen ne volas nin agnoski fratoj...

La novelaro de Golden ŝajnas demonstri tion, eĉ preter la simpla banala ordigo hieraŭ-hodiaŭ-morgaŭ; kaj, estante profesie arkeologo, li estas en la plej bona situacio por konstati kaj konstatiĝi tian fratecon.

Ni legu la unuan rakonton. Franca arkeologo esploras groton prahistorian en danĝera terfalema deklivo; lia filo, dekunujara, restas ekstere. La arkeologo trabatas al si la vojon per pioĉo, malgraŭ la atentigoj de siaj kolegoj. La parioj de la groto, kiu estis jam parte detruita de terlavango, refaldiĝas sur lin. La knabo restas ekstere, vane lin vokanta. Sed la rakonto estas interplektita alterne kun alia rakonto: antaŭ dekoj da miljaroj, aliaj homaj estaĵoj eniris la saman groton, por inica ceremonio; ankaŭ tiam ili diris la samajn vortojn, spertis la samajn timojn, mortis per la sama morto; ankaŭ tiam knabo restis ekstere, vane vokante sian paĉjon. La du eventoj estas tiel similaj, kaj la sentoj tiel egalas, ke ĉiu rakontpeceto de la nuntempa okazaĵo finiĝas per la samaj vortoj kiuj malfermas la respondan rakontpeceton de la iama. Dek fojojn la ludo ripetiĝas, kaj tiu kunligado, ĉiam pli streĉa, en speco de kresĉendo, ĝis la tondro de la terfalo, prenas nin kiuj legas, kvazaŭ tramiljara mistera fatalo.

Venas poste aliaj noveloj: Egiptujo de la faraonoj enkadrigas la duan — kaj tie ĉi mi eksaltis, ĉar la ekiro estas tiel bone konata al mi: fresko en la Egipta Muzeo de Torino. Temas pri profanado kaj avido, ve, kiom komunaj al nia tempo kaj al tiu! Sekvas du orientaj vizioj, sed trapikitaj per ŝtelo, koruptado kaj firuzo, ĉiamaj homaj proprajoj. Post tiuj, ni abrupte transportiĝas al Nord-Ameriko, indianoj kaj blankhaŭtaj soldatoj, venĝo, kontraŭvenĝo, milita kruelo. La temoj de milito kaj kruelo, de ruzo kaj superruzo, de perfido kaj morto kune grupiĝas en la sesa novelo,

pri spionado en la nuna tempo. Ni atingis do la nunon. Jen nun la morgaŭo aŭ almenaŭ la sekvo de la antikva kaj de la hieraŭa tempo. La sepa novelo memorigis min pri iu alia novelo, de Szathmári: kia kaj kie estas la nuda moralo? Antaŭenirante al la fino de la libro, ni ankoraŭ renkontas, sed iel serena rideto ilin vestas, rakontojn pri venĝo kaj trompo. Golden pliheligas ankoraŭ la etoson per la lastaj du pecoj: ĉi tie ni estas ĉe sciencfikcio, kaj la strangajn okazaĵojn ni devas akcepti kun filozofia sinteno, kiel ludon kaj adiaŭon de la verkisto.

Kial ni ne rezistas la tenton relegi la unuan novelon, tuj fininte la libron? Kiel mi, aliaj tion faros. Eble ĉar la epizoda fresko pri la homaro neeviteble resendas al front-al-fronto de la nuno kun la antaŭmiljaroj; eble ĉar la kontrapunktado de la du rakontoj prezentas la plej bonan esprimon de la arto de Golden; aŭ eble ĉar ni emas retrovi la homon, t.e. ĉiun el ni mem, pura kaj senkulpa, simpla kaj nobla-nima kaj lavi, en la grota rivero de la inicado, ĉiun spuron, ĉiun makulon de la postvenintaj "ni".

Clelia Conterno (Italio)

Nia unua profesinivela disko

Esperanto kaj libereco, de Max Roy Carrouges (tekstoj) kaj T. Turens (muziko). Kantas M.R. Carrouges. Paris: Arion, 1982. Duflanka stereofonia disko kun Esperanta teksto sur la kovrilo. 30cm. 33 t/m. ARN 34666. Orkestron direktas J.-C. Passaga. Prezo: 27,90 guldenoj.

Sur disko, profesia jam de la kovrilo dufalda kun profesia ornamaĵo, kun profesia muziko de profesia orkestro en profesia stereofonia sontekniko, Max Roy Carrouges kantas per profesia voĉo pri la tri temoj: Esperanto, libereco kaj amo. Nur la tekstoj kelkloke ne kvalifikiĝas tianivele. En la klasifo de Corsetti — popola, folklora, engaĝa, ĝenerala — ĉi tiu disko rangas en la kategorio "ĝenerala". Kun hezito mi karakterizus ĝin ankaŭ kiel pop-muzikon, laŭ la speco de la uzitaj ritmoj, kvankam ne de la angla-usona ĝenro en kiu superregas la perkuto kaj basgitaro sur fono de malsilento. La stilo de Carrouges estas pli milde diafana kaj melodia, kaj memorigas min pri la francaj kanzonistoj Aznavour kaj Ferrat. Kelkfoje ankaŭ pri la infana optimismo de itala populara muziko.

La prononco absolute ne suferas pro la franca deveno de la kanzonisto kaj la lingvaĵo estas bona Esperanto, "kontrolita per" akademiano, kiu nepre ne tolerus falsajn amikojn. Nur, la gramatikaj vortakcentoj estas ofte maltrafaj, kio estas al miaj oreloj tre ne akceptebla. La rokenrolo de "Tiel estas la viv" ne konvinkas. Al mi pleje plaĉas la lirikeco kaj la melodio de la kanzono "Vincent".

Ĉi tio eble estas nia unua leĝera disko, kiu trovas senbaran vojon al la programoj de la nacilingvaj sendstacioj. Pri tio ankaŭ aŭguras la franclingva kovrildorso, kiu memfide turnas sin al la neesperantista publiko.

Rob Vetter (Nederlando)

Volumo bravure bela kaj impona

Metamorphosen — Die Infra-Realität unserer Zeit (Metamorfozoj — La infrarealo de nia epoko), de Michel C. Jullian. Baden-Baden: Verlag Dr. Klaus Piepenstock, 1982. 196 p. Ilus. 30 × 31 cm. ISBN 3 921633 00 1. Kvarlingva eldono (germana, franca, angla, Esperanto). Prezo: 66,00 gld.

La surealismon mi spertis unue kiel studento en Edinburgo: la ekvido rabis mian spiron — la fantaston, la vizion mi akceptis nature, kiel en sonĝo: klarigon mi ne bezonis. Dudek jarojn poste mi vidis en Londono ekspozicion de Magritte kaj trapromenis ĝin sorĉite. Ne mirinde, ke la surealismo, farinte la siaĵon en la dudekaj jaroj, obsedis pentristojn anko-


raŭ longe, ĝis eĉ Michel C. Jullian, francogermano naskita en 1945.

Por la fantasta artisto, tero kaj etero, nuno kaj iamo, estas libere vojaĝeblaj. Sed por kio? Nostalgia revo, emocia sindorloto, aŭ por renkonti la aktualon, eĉ per antitezoj?

La verkojn de la surealistoj ni hodiaŭ vidas laŭ ilia epoko, kiam ili servis salubre al la arto tiutempa. Estas same kun aliaj artepokoj. Kaj la posta imitemo estas simpatia omaĝo, jes, sed sen nova elano ĝi nin ne kroĉas per valoro hodiaŭa.

Metamorfozoj estas volumo grandformata, pompa kaj peza, kun luksa papero, preso ŝike elektita, kaj prezentaj artikoloj en la germana kun tradukoj en franca, angla kaj Esperanto, ĉio eminente bona. Ni legas, ke la artisto pentras, gravuras, ceramikas, faris publikajn komisionojn de murmozaikoj kaj bareliefoj — sed krom unu kovrila pentraĵo, temas pri albumo nur de grafikoj — pliparte de akvafortoj kun akvatinto. Pulsas bizara fantazio kaj tiklas erotiko.

En tiuj bildoj karambolas klasikaj kolonoj kaj fabrikaj fumtuboj, nudulinoj langvore rigardas nenien dum kirasitaj kavaliroj apudas, vesperformaj flugaparatoj krozas sur silenta ĉielo, kaj surtere ram-



Michel C. Jullian:
*Ĉu konflikto de epokoj,
de arto kaj tekniko?*

pas arboradikoj kaj naŭzas muŝegoj. Pri la virtuozece de Jullian oni ne dubas, sed ĉu hazardo estas, ke la sola portreto (de virino) estas unike vaka kaj nesukcesa? Eble ne en tia realo fortas la artisto.

Jen tunelo traboras altaĵon kun romanika ruino supre, kaj elkuras lokomotivo, sputante fumon en formo de la Venuso de Botticelli, renkonte al busto de Minerva, dum lianoj disradias antaŭ ĝia impeto. Konflikto de epokoj, de arto kaj tekniko, ĉu? Do kial la lokomotivo — kiel aliloke flugmaŝinoj kaj horloĝoj — estas mem de arkaika tipo?

Horst Fischer tradukis ĉiujn tekstojn en Esperanton kaj William Auld finkontrolis la Esperanto-tekstojn kaj tradukis la poemojn en la anglan kaj la Internacian Lingvon. La eldonintoj estas gratulindaj pro volumo bravure bela kaj impona.

Reto Rossetti (Britio)

Multfaceta impresio pri la vjetnama kulturo

Blanka sablo. Diversaj aŭtoroj. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 55 p. Ilus. 16 cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

”Hai Son” floroj, de Dang Ai k.a. El la vjetnama trad. Minh Kinh. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 71 p. 16 cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 guldenoj.

Miriadoj da lumoj. Div. aŭtoroj. El la vjetnama trad. Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 61 p. Ilus. 16 cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

Reveno. Div. aŭtoroj. El la vjetnama trad. Minh Kinh. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1981. 80 p. Ilus. 16 cm. Kolekto Hibisko. Prezo: 3,00 gld.

La kvar libretoj prezentas po tri tradukitajn rakontojn, kiuj kolektiĝis el diversaj epokoj de la vjetnama historio. La plimulto tamen estas modernaj noveletoj, dum nur du rakontoj — cetere la plej legindaj (”Tâm kaj Cam” en *Miriadoj da lumoj* kaj ”La mirinda renkonto de l’ Blua Rojo” en *Blanka sablo*) — estas el legenda pratempo. Tiu miksiĝo kaŭzas la kontrastoriĉan karakteron de la eldonserio kaj sukcesas malpezigi la banalecon de kelkaj pli modernaj noveletoj. Tiuj celas konigi precipe nuntempajn morojn kaj vivokondiĉojn en Vjetnama Socialisma Respubliko, kaj efektive, la kolekto postlasas multifacetan impreson pri kulturo tute fremda, ekzotika el la vidpunkto de eŭropano.

Lingve, la ofta uzo de kompleksaj verboformoj certe rimarkiĝas (precipe en la rakonto ”Hai Son’ floroj” en la samnoma libreto). Ne ĉiam la kialo de tiu trouzo rekoneblas, kaj de tempo al tempo, ĝia abundo kaŭzas gramatikajn erarojn. La neeŭropeco

de la lingvaĵo tamen naskas multajn interesajn kaj atentindajn kunmetaĵojn kaj parolturnojn, kiuj per sia logika kaj samtempe eleganta karaktero surprizas leganton, kiu kutimas al eŭropeskaj idiotismoj kaj neologismoj.

Kvankam tri el la libretoj enhavas nigrablankajn ilustraĵojn, kiuj sukcese vigligas la akurate sed ne tro interese kompostitan tekston, ankaŭ la ekstera aspekto estas senpretenda. Tio tamen ne estu malrekomendo al tiuj, kiuj volas per tiuj ĉi eldonaĵoj tutmondigi sian Esperanto-bibliotekon.

Martin Haase (FR Germanio)

Laste aperis...

Ĉu mi lernu Esperanton?; Enkonduko en la teorion de lingvaj ludoj, R. Selten kaj J. Pool. Bielefeld: Universität Bielefeld, 1982. 55+5p. Ilus. Mimeo. 30cm. Prezo: 6,00 gld.

Esperanta-rusa vortaro (1974), E. Bokarev (1904-1971). Moskvo: Eldonejo ”Rusa Lingvo”, 1982 (represo). 488p. 17cm. Ĝi entenas preskaŭ 26 000 vortojn, kun aldono de mallonga gramatika skizo pri Esperanto. Prezo: 15,00 gld.

Esperanto in the Modern World / Esperanto en la moderna mondo; Studoj kaj artikoloj pri lingvaj problemoj, la rajto je komunikado kaj la internacia lingvo. (1959-1982). Kompilis: R. kaj V. S. Eichholz. Bailieboro: Esperanto-Press, 1982 (dua eldono). 600p. 21cm. ISBN 0 919186 18 1. Dulingva eldono en la angla kaj Esperanto. Bindita. Prezo: 66,00 gld.

Esperanto lingvistisk set, John C. Wells. En la danan trad. Preben V. Bagger. København: Gyldendalske Boghandel Nordisk Forlag, 1982. 112p. 21cm. ISBN 87 00 15291 9. Dana traduko de *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Prezo: 29,70 gld.

Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado; Raporto pri la 67a UK de Esperanto. Rotterdam: UEA, 1982. 15p. 21cm. Esperanto-Dokumentoj n-ro 17 E. Prezo: 3,00 gld.

Gramatika demandaro resumao. Kompilis Julio Baghy. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982 (4a eldono). 39p. 20cm. ISBN 963 571 108 5. Prezo: 6,00 guldenoj.

Kelkaj pensoj pri Esperanto kiel maŝintraduka ponto-lingvo, W.F. Pilger. Lelystad: Vulpo, 1983. 32p. 21cm. ISBN 90 70074 33 8. Prezo: 12,00 gld.

Rakontoj pri Afanti; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina trad. Fan Yuzu. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 71p. Ilus. 18cm. Kelkdeko da spritaj rakontetoj pri legenda heroo de pluraj naciecoj de Ĉinio. Prezo: 3,00 guldenoj.

Rompitaj flugiloj, La; Ama romano, Ĝ. Ĥalil’ Ĝibrān’. El la araba trad. G. Abraham. Rio-de-Janeiro: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, 1981. 107p. 21cm. Prezo: 12,50 gld.

Situacio de Esperanto en Slovaka Socialisma Respubliko, Pavel Rosa, Bratislava: Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR, 1977. 34p. Mimeo. 21cm. Prezo: 2,40 guldenoj.

Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj, Jan Rybář. Praha: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1982. 52p. 21cm. Prezo: 6,90 gld.

Tempo (1934-1940). Nagoya: Eldona Societo de Nagoya Esperanto-Centro, 1982 (fotorepreso de la unua eldono). 444p. 30cm. Bind. Kolekto de la iama japana monata gazeto pri politikaj kaj sociaj demandoj, kun postparolo de Yasutarô Nozima kaj Ulrich Lins. Prezo: 132,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20%, por la mendoj super 200 guldenoj – 10%. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

La rubrikon prizorgas: P. Hopkins, 157 University Ave W., nr. 111, Waterloo, Ont., Kanado N2L 3E5.

Triafoje en Strasburgo

Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO organizas denove, kiel en 1980 kaj 1981, seminarion en la Eŭropa Junulara Centro (EJC) en Strasburgo (Francio). Ankaŭ la Centro mem kunlaboras en la organizaj laboroj por la seminario, kiu traktos ĉi tiun amplekse formulitan temon: "Partopreno en amaskomunikado: Realeco kaj teorio de partopreno en radio kaj televido en Eŭropo kaj en la Tria Mondo".

La seminario okazos de la 24a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1983. La seminario situas tre proksime al la sidejo de Eŭropa Konsilio. La Centro — fondita en 1972 — disponigos al la seminario du komfortajn konferencajn ĉambrojn, kun instalaĵoj por kvarlingva interpretado kaj riĉa specialigita biblioteko pri la internaciaj junularaj rilatoj. La loko ofertas idealajn kondiĉojn por la junaj homoj, kiuj deziras renkontiĝi

sur eŭropa nivelo, por ekkoni kaj disvolvi novajn manierojn de kunlaboro, interŝanĝi informojn kaj opiniojn.

La seminarion partoprenos ĉ. 30 gejunuloj el pluraj eŭropaj landoj. La kostoj estas minimumaj: 150 francaj frankoj (55 guldenoj) por la tutsemajna restado. Krome, EJC repagos la vojaĝkostojn kaj la perditan salajron al tiuj, kiuj partoprenos la plimulton de la seminaria programo. Ĉio ĉi eblas pro la financa subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo, kiu ankaŭ pli frue subvenciis la seminariojn de KER.

Kvankam Esperanto estos la ĉefa laborlingvo de la seminario, pro la ĉeesto de ekstermovadaj prelegantoj oni utiligos ankaŭ la francan kaj la germanan lingvojn.

KER planas ĉi-jare du pliajn seminariojn, kun financa subteno de Eŭropa Junulara Fondaĵo. La unua okazos de la 3a ĝis la 10a de septembro en la proksimeco de Amsterdamo, kaj ĝi traktos la temon: "Tendencoj al maldemokrataj solvoj de la nuntempa ekonomia krizo". La alia estos en la okcidenta Berlino, de la 20a ĝis la 27a de novembro, kaj ĝi okupiĝos pri: "Enŝaltiĝo en elektronikan informreton". Detalojn petu de KER ĉe la CO de UEA/TEJO en Roterdamo.

Norbert Silling

Vervo en Sud-Ameriko

Kiel ni jam plurfoje emfazis, unu el la ĉefaj surprizoj en la 66a UK antaŭ du jaroj en Brazilio, estis la multnombreco de la junaj sudamerikanoj, kiuj venis tien. Surpriziĝis ĉefe la okcidenteŭropanoj en kies lokaj kluboj kaj landaj asocioj gejunuloj estas raraj kaj malmultaj. Tial estis aparte inspire vidi tutajn brigadojn da sudamerikaj gejunuloj svari en Brazilio. Pluraj lastatempaj informoj indikas, ke tiu trajto de la sudamerika movado estas io konstanta, do ankaŭ nun aktuala. Jen du ekzemploj:

Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kongresis dufoje post la evento en Brazilio. Ambaŭfoje BEJO elektis por siaj kongresoj forajn, ne-turismajn lokojn, ĉar la celo estis efike labori kaj ne nur amuziĝi kaj bele pasigi la tempon. Tial okazas, ke post la lasta kongreso en Iporá tuj malfermiĝis kvar Esperanto-kursoj por la komencantoj de la kongresa loko. Ke la renkontiĝo de BEJO efektive vekis grandan intereson en Iporá pruvas ankaŭ la fakto, ke la nunan kaj estonta urbestroj venis saluti la kongresanojn, kiuj kolektiĝis el dek federaciaj ŝtatoj de la vasta lando. Al la konantoj de la brazila movado ŝajnas, ke BEJO jam fariĝis tute samranga partnero de la tri aliaj landaj Esperanto-organizaĵoj. La avantaĝo de BEJO estas la juneco de ĝiaj membroj kaj la vervo, kiun tiu juneco portas kun si.

En malpli granda skalo ol BEJO aŭdiĝas lastatempe alia sud-amerika sekcio de TEJO — ArgentEJO (Argentina Esperantista Junulara Organizo). Kvankam multoble malpli granda ol BEJO, ArgentEJO jam realigis sian unuan tutlandan renkontiĝon. Du aspektoj de la laboro de ArgentEJO ŝajnas aparte interesaj: Oni fondis tie "Cirbliotejo"-n, tio estas cirkulantan bibliotekon, kiu vojaĝigas la librojn de unu membro al alia. Interese kaj utile! La alia novaĵo estas malpli originala sed almenaŭ same utila — speciala koresponda kurso por la gejunuloj. Ĉar ArgentEJO do kreskas, devus grandiĝi ankaŭ ĝia "Cirbliotejo". Eble ankaŭ vi havas superfluan Esperantolibron, kiu povus ekcirkuli tra Argentino? (Adreso: ArgentEJO, C.C. 114 – Suc. 53 (B), RA-1453 Buenos Aires, Argentino).

Labortendaroj

La ĉi-jara katalogo pri la junularaj labortendaroj aperos en aprilo. Ĝi enhavos informojn pri ĉiuj laboraranĝoj en 1983 en kiuj la Internacia Lingvo estos uzata aŭ instruata. La katalogo disponeblas en Esperanto kaj en la lingvoj angla, franca kaj nederlanda. Oni povos (fine de aprilo) peti ĝin de la CO en Roterdamo.




● **Italio:** Internacia Ekspozicio de Turismaj Afiŝoj kaj Broŝuroj en la Mondo, kiu antaŭ nelonge okazis en Kaltaĝiruno (Caltagirone) en la suda Italio, rikoltis amasan interesiĝon de la publiko kaj malavaran financon subtenon de la lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj. La ekspozicion, kiu ja rilatis nur la Esperantajn turismajn eldonaĵojn, organizis la Esperanto-grupo en Catania kaj la loka UEA-delegito, Emanuele Virgillito. Tre valoran helpon donis Gianbattista Nikastru, nacia sekretario de la minoritata etna societo "Siĉilio Nia", kiu utiligas la Internacian Lingvon. Pro la sukceso de la ekspozicio, oni planas, ke ĝi fariĝu tradicia aranĝo, kaj ke ĝi komencu migri de unu itala urbo al alia. Pri la evento tre favore raportis la loka gazetaro.

● **Eŭropa Komunumo:** La 13an de januaro 1983, la prezidanto de UEA G. Maertens kaj la direktorino de Eŭropa Esperanto-Centro A. Tilmont faris viziton al s-ino van Hoof, ĝenerala direktoro pri la servoj por tradukado kaj interpretado en la Komisiono de Eŭropa Komunumo. S-ino van Hoof estras la plej grandan tradukistan kaj interpretistan servon en la mondo (431 plentempaj kaj 1117 parttempaj laborantoj por prizorgi pli ol 9000 konferencojn kaj aliajn kunvenojn jare). Dum tiu grava vizito montriĝis, ke la Internacia Lingvo kaj ĝiaj spertoj estas tiel interesaj por la koncernaj instancoj de la Komunumo, ke oni planis sendi observantojn al tri baldaŭaj movadaj aranĝoj: rapida Esperanto-kurso en Antverpeno (marto), KER-seminario (aprilo, vidu la paĝon 35) kaj la 68a UK en Budapeŝto. La vizitantoj havis la impreson, ke oni poste en la Komunumo atente ekzamenos la raportojn de tiuj observantoj. Ĉio ĉi estas kvaŭ la unua grava rezulto de tre intensa informkampanjo, kiun dum la lastaj jaroj entreprenis — kaj daŭrigas — la Centro.



● **FR Germanio:** Esperanto-Klubo de Munkeno estas unu el la plej agemaj grupoj en la lando. Al ĝia Zamenhofa Festo, fine de la pasinta jaro, venis 116 ĉeestantoj. Dum la festo, F. Hilpert, vicprezidanto de la Klubo (dekstre sur la supra foto), transdonis premiojn al la plej aktivaj anoj. Gastprelegis S. Maul (dekstra foto), redaktoro de *Monato*.



● **Hinda Unio:** Federacio Esperanto de Bharato (FEB), sekcio en la bengala ĉefurbo Kalkato, unuafoje aranĝis oficialan Esperanto-ekzamenon. Ni ne scias kiom da kandidatoj faris la ekzamenon, sed laŭ aliaj informoj ŝajnas, ke temis pri altnivela aranĝo: la ekzamenon gvidis d-ro P. Sinha Roy, antaŭa estro de la studoj pri kompara filologio kaj lingvistiko ĉe la Universitato de Kalkato, kaj la ekzamenajn demandojn kunmetis d-ro Probal Daŝgupto.

● **Hispanio:** Ŝajnas, ke plurloke en Hispanio la Movado aparte viglas lastatempe: Barcelono, Madrido, Santiago, Valladolid... El Valencio atingas nin regule la kluba bulteno *Valencia luno*, en kies januara numero ni legis plurajn interesajn novaĵojn. La provinca registaro fincos la disponigon de kelkaj bazaj informlibroj pri Esperanto al preskaŭ tricent publikaj bibliotekoj en la regiono. Urbaj aŭtoritatoj de Valencio fincis la partoprenon de la E-klubo en junulara foiro (de la 26a de decembro ĝis la 5a de januaro). Tie disdoniĝis pli ol kvin mil faldfolioj pri Esperanto kaj okazis du radiointervjuoj kun deĵorantoj ĉe la stando. La faldfolioj fincis la provincaj aŭtoritatoj, kiuj pagos ankaŭ ĝian duan eldonon (eldonkvanto 30 000 ekzempleroj).

Fake

● **Skoltoj:** En nia numero de oktobro (p. 166) ni aperigis inviton al konkurso por 25 premioj po 200 kanadaj dolaroj, por tiuj skoltoj, kiuj plej bone parolos Esperanton, dum la Monda Ĵamboreo, ĉi-jare en Kanado. Bedaŭrinde, ni ĵus informiĝis, ke la konkurso estas nuligita, pro la insistoj de la ĉefa organiza stabo de la Ĵamboreo. Oni tamen permesos, ke en tiu granda skolta manifestacio (oni atendas ĉ. 16 000 partoprenantojn) estu aranĝita informa stando pri la Internacia Lingvo, kiu delonge havas bonajn ligojn al la skolta movado. Se vi tamen intencas partopreni la Ĵamboreon, anoncu vin al s-ro P. Ronald (45, 10th Ave., Roxboro, Qué., Kanado H8Y 2N3), de kiu petu ankaŭ klarigojn pri la konkursnuligo.


● **Periodaĵoj:** *La dua buso* estas la nomo de la feniksa formo de *L'omnibuso*, japana literatura revuo, kiu ĉesis aperi antaŭ du jaroj. Ni ne scias precize, kial *L'omnibuso* devas malaperi, por ke naskiĝu *La dua buso*, des pli ke ambaŭ revuojn prizorgas la samaj homoj: M. Miyamoto (redaktoro), E. Saito (eldonanto). Aldone al ĉio ĉi, la nova revuo (ankaŭ kvaronjara) estas ne malpli interesa ol la antaŭa. Jarabono kostas 1 500 enojn.

● **Interlingvistiko:** Jam de pluraj jaroj la studenta Esperanto-movado en Pollando apartenas al la plej viglaj kaj plej altkvalitaj en tiu specifa medio. En ĝia sino edukiĝis pluraj jam internacie renomaj interlingvistoj, ĉefe tra la tradicia Scienca Interlingvistika Simpozio. Ĉi-jare ĝi okazos, por la dekunua fojo, de la 9a ĝis la 13a de aprilo en la pola ĉefurbo Varsovio. Estas interese noti, ke oni ĉi-jare planas partoprenon de pluraj interlingvistoj el Soveta Unio (Isajev, Kuznecov, k.a.), sed ne mankos ankaŭ alilandaj partoprenantoj kaj prelegantoj (Duc Goninaz, Frank, Pennacchietti, Szerdahelyi, Lo Giacomo, Linstedt, Silber k.a.). Adreso de la organizanto: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, c/o Rada Naczelna ZSP, ul. Ordynarska 9, PL-00-364 Warszawa, Pollando.

● **Organizaĵoj:** Laŭ la ĵus aperinta *Adresaro 1983-1984*, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) havas entute 1662 membrojn en 42 landoj. Grandega plimulto (87%) el ili loĝas en Eŭropo —

1455 membroj; sekvas Azio 118, Nord-Ameriko 37, Sud-Ameriko 34, Aŭstralio 16 kaj Afriko 2. Francio estas la ĉefa "bastiono" de SAT, ĉar tie vivas 459 SAT-anoj (ĝi estas rekorda lando ankaŭ de UEA, kiu tie havas 601 individuajn membrojn). La aliaj landoj kun la plej multa membraro de SAT estas: Nederlando 228, FR Germanio 167, Svedio 118, Jugoslavio 115 kaj Japanio 103.

● **Tradukado:** En la nederlanda revuo *Van taal tot taal* (De lingvo al lingvo), n-ro 26/4 de decembro 1982, aperis artikolo "Tradukado en kaj el Esperanto" de d-ro W.A. Verloren van Themaat. La revuon eldonas Nederlanda Asocio de Tradukistoj.



● **Åberg:** Pacasocio de Stokholmo aljuĝas ĉiun trian jaron (ekde 1946) t.n. lingvopremion, kiu jam plurfoje iris al elstaraj svedaj kaj alilandaj esperantistoj. Fine de 1982 la premion ricevis s-ro Lennart Åberg el Gotenburgo. Li estas unu el la plej konataj svedaj Esperanto-aktivuloj jam de pluraj jardekoj (Åberg lernis Esperanton antaŭ 50 jaroj, en



1933). Li estas internacie konata kiel gvidanto de Inter — Agadgrupo por Esperanto, kiu jam de jaroj organizas sukcesajn prelegvojaĝojn de eksterlandaj esperantistoj en svedaj lernejoj kaj aliaj

● **Blinduloj:** Laŭ pluraj informoj ŝajnas, ke Esperanto fariĝas ĉiam pli kaj pli populara inter la blinduloj en Soveta Unio. Pasintjare okazis apud Moskvo renkontiĝo de blindaj esperantistoj, kun partopreno de 103 personoj el 7 sovetaj respublikoj. Aldone al pluraj jam brajligitaj Esperanto-libroj, nun oni atendas brajlan eldonon de la *Esperanta-rusa vortaro* de Bokarev. Por brajla aperigo dum 1983 estas antaŭvidita ankaŭ la antologia volumo *Estona soveta poezio*.

● **Aeronaŭtiko:** Ĉeĥoslovaka laborgrupo por aeronaŭtika terminologio planas apartan fakan kunvenon dum la 68a UK en Budapeŝto. Antaŭ nelonge aperis ankaŭ la unua numero de ĝia duonjara bulteno *Avio*, kiu enhavas terminologian rubrikon kaj publikigas enhavtabelojn de nacilingvaj fakaj revuoj. Adreso: *Avio*, ĉe s-ro Karel Franc, Dukla 2287, CS-530 02 Pardubice, Ĉeĥoslovakio.

Persone

publikaj lokoj. Kiel kutime kiam temas pri Åberg, la nacilingva gazetaro dediĉis abundan spacon al la novaĵo pri la premio por li.

● **Bannier:** Unu el la kunfondintoj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), Lucien Bannier, festis la 12an de januaro sian 90an datrevenon. Bannier lernis Esperanton en 1906, estis membro de UEA komence, sed post la fondiĝo de SAT en 1921 aktivis ekskluzive en la laborista Esperanto-Movado. Li ankoraŭ estas kasisto de SAT, kaj membro de ĝia Plenum-Komitato li estis ĉiam, tra la tuta 62-jara historio de la organizaĵo.

● **Barrocas:** La kemiisto Alberto Barrocas, peranto de UEA en Urugvajo, pasigas 6-semajnan studovojaĝon en Francio, laŭ invito de franca registara instanco pri teknika kunlaboro. Barrocas utiligis la okazon por en Eŭropo (dum februaro kaj marto) kontakti kelkajn siajn movadajn samfakulojn (ekz. M. Westermayer kaj B. Vogelmann en FR Germanio), viziti UEA en Roterdamo kaj fari kelkajn prelegojn pri Urugvajo. Lia faka revuo *Kemio internacia* (ankoraŭ havebla ĉe UEA), kiu aperadis en Montevideo de 1965 ĝis 1968, sendube estas unu el la plej seriozaj movadaj provoj eldoni altnivelan fakan periodaĵon en la Internacia Lingvo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Nederlando: T. v. Schenkhof; W. Koopmans. Svislando: M. Schoutsen. Britio: H. Gilmore. Usono: D.L. Mason; E.H. Thompson jr. Italio: Carlo Minnaja. Francio: H. Boyet; R. Villégier. Norvegio: E. Gjessing.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Brazilo: Délio Pereira de Souza. Finnlando: Niilo Kavenius. FR Germanio: Harry Bily; Werner Heinrich. Francio: Henri Dabiez; Jean-Paul Beau. Japanio: Sin'itirô Kawamura; Koiči Ŝimizu; Takeo Sugano; Toshide Kuwahara; Toyozo Nisikawa. Nederlando: C. Mook-van der Laan; W.H. Mook. Norvegio: Olaf Maeland; Pepita de Caspary. Svedio: Maja Ahlström; Åke Blomberg; Einar Rasmussen; Folke Pettersson. Usono: Frederik J. Belinfante; L.A. Walther; Douglas B. Swett.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimуме \$100): Nov-Zelando: Jeannie Wilson.

SUBTENANTOJ (minimуме \$25): Aŭstralio: T. Metherall. Belgio: Maurice Borguet. Britio: Sybil V. Sly. FR Germanio: Hans-Dietrich Quednau. Francio: Mondcivitanoj; Esperanta Kultura Centro; René Lemaire; Louise Marin; Renée Triolle.

AMIKOJ (minimуме \$10): Aŭstralio: T. Elliott. Belgio: Herman Deceuninck. Finnlando: Hemmo Tietti; Veera Tietti. FR Germanio: Richard Wluka. Francio: Martial Barry; Emilienne Gallon; Jean Dérédec; Kom. pri Eksteraj Rilatoj de UFE; Suzanne Nourmont; Centre Culturel Esperanto, Yvetot.

PATRONOJ DE TEJO 1983

Argentino: Bruno Ostropolski; Mariano D. Ibañez. Aŭstralio: Gerald S. Tuman. Belgio: Eliza Kehlet. Brazilo: Vena D. Mascarenhas; Vicente Paulo Werneck. Danlando: Georg Kustos. FR Germanio: Didier Izacard. Francio: Barbara Despiney; Jean Doublet; Marcel Jullien. Hispanio: Aquiles Sanz. Italio: Carla De Lorenzi; Karl Trimborn; Sergio Martina. Jugoslavio: Esperanto-Societo Osijek. Nederlando: B. Kappert; F.J. Pieterse-Kruger; Joaquim Calado; Louise Adelaar. Nov-Zelando: G.M. Sutton.

DONACOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 24a de februaro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Finnlando: F-ino M. Rautio 48,00. FR Germanio: Esperanto-grupo en Schwelm 21,25. Ebury Bordo: N. N'Goran 17,66. Japanio: S-ino K. Kikusima 810,00. Britio: B.W.G. Phillips 33,04. Sumo ĉi-jara: 929,95.

FONDAĴO CANUTO: Nederlando: F-ino S. v. Wijngaarden 100,00. Finnlando: S-ino I. Helsingius 59,04. Svedio: Sven Sundin 42,80; S-ino U. Luin 68,40. F.R. Germanio: W. Heinrich 1 097,10. Japanio: Yoshiko Narita 100,00. Diversaj malgrandaj 4,08. Sumo ĉi-jara: 1 471,42.

ĜENERALA KASO: Usono: A. Tate 1000,00. Svislando: H. Schmutz 54,91; S-ino L. Grütter 53,76. Kanado: F-ino D. Hawley 142,02. Finnlando: A. Ratalahti 329,64; Niilo Kavenius 193,95. Nederlando: A.W. Treurniet 12,50; R. Bossong 12,50. F.R. Germanio: Amelia Garcia 39,76. Britio: Ray Smith 10,41. Div. malgrandaj 29,47. Sumo ĉi-jara: 1 878,92.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Belgio: S-ino Bernaerts-Toussaint 41,60.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Francis H. Summer 1 281,13. Heredaĵo A.W. Thompson 96,09. Sumo ĉi-jara: 1 377,22.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J.v.d. Teems 20,00.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: S-ino R. Paintner-Trumpp 1 104,55.


Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Novaj kotizoj por Sud-Ameriko kaj Israelo

Pro la ĉiam pli grandaj problemoj fiksi por kelkaj landoj la kotizojn en la loka valuto, tiel ke ili validu iom pli longe, la CO nun estis devigita difini tiujn kotizojn en guldenoj. Pri la lokvalutaj ekvivalentoj bv. konsulti la pernatotojn.

Lando	AM	MJ (-K)	MA (-K)	SA	Kto	SZ
Argentino	0,86	17,20	43,00	25,80	12,90	86,00
Brazilo	0,78	15,60	39,00	23,40	11,70	78,00
Ĉilio	0,76	15,20	38,00	22,80	11,40	76,00
Israelo	1,04	20,80	52,00	31,20	15,60	104,00
Kolombio	0,75	15,00	37,50	22,50	11,25	75,00
Meksikio	0,78	15,60	39,00	23,40	11,70	78,00
Urugvajo	0,80	16,00	40,00	24,00	12,00	80,00
Venezuelo	0,90	18,00	45,00	27,00	13,50	90,00

Ĉi tiuj kotizoj ekvalidos la 1-an de aprilo 1983.



Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Ĉe-metode instruadu ankaŭ vi, private aŭ lerneje, laŭ: *Esperanto laŭ la patrina metodo*, 320 paĝoj, GM 50,00! 50-instruhora kabareto lernigas **esperante** kaj **germane** ĉiujn demandojn kaj respondojn de la ĉiutaga konversacio! August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61, poŝtĝirkonto Hamburg 150 58-209.

37-jara dommastrino serĉas korespondantinojn pri manlaborado kaj aliaj temoj: s-ino Rita Bloom, Am Kirchensiek 29, D-3370 Seesen, FR Germanio.

Lerni paroli Esperanto-lingve per la sukcesaj *Facilaj dialogoj!* Aŭfrankite: 29 francaj frankoj. Ligue "Pro UNESCO", 24 ave Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris.

9 geknaboj, 13-18-jaraj, atendas salutkartojn el la tuta mondo. Esperanto-Klubo CES, Château Coin, F-49150 Baugé, Francio.

Svisaj brakhorloĝoj, kvarcaj, kun la komercmarkoj "Bonan tagon" kaj "La verda stelo", estas haveblaj. Magazenprezo por unu horloĝo estas 140 svisaj

La membraro de UEA en 1982

Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo	Lando	AM	IM	Sumo
Afganio	—	1	1	Kamerunio	—	1	1	Sud-Jemeno	—	1	1
Albanio	—	1	1	Kanado	200	92	292	Svazilando	—	1	1
Alĝerio	—	1	1	Kenjo	—	1	1	Svedio	1143	435	1578
Angolo	—	1	1	Kolombio	—	30	30	Svislando	143	175	318
Argentino	216	86	302	Korea Resp.	283	41	324	Tajlando	—	4	4
Aŭstralio	156	113	269	Kostariko	—	2	2	Tunizio	—	2	2
Aŭstrio	268	65	333	Kubo	—	17	17	Urugvajo	—	4	4
Bangladeŝo	—	1	1	Kuvajto	—	2	2	Usono	296	406	702
Belgio	1013	273	1286	Libano	—	1	1	Vatikano	—	1	1
Bocŭano	—	2	2	Liberio	—	1	1	Venezuelo	13	19	32
Bolivio	—	2	2	Luksemburgo	93	8	101	Vjetnamio	—	5	5
Brazilo	695	458	1153	Madagaskaro	—	1	1	Zairio	21	7	28
Britio	924	373	1297	Malajzio	—	2	2	94 landoj	30068	6556	36624
Bulgario	5110	92	5202	Malto	50	1	51	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1981 KAJ 1982			
Ĉeĥoslovakio	2272	115	2387	Maroko	—	3	3				
Ĉilio	45	10	55	Meksikio	35	23	58				
Ĉinio	1119	25	1144	Mongolio	—	2	2				
Danlando	302	115	417	Namibio	—	1	1	Kategorio	1981	1982	
Ebura Bordo	—	3	3	Nederlando	403	440	843	Membro-Jarlibro	1239	1115	
Egiptio	—	1	1	Nepalo	—	2	2	Membro-Abonanto	4077	4015	
Ekvadoro	—	1	1	Nigerio	—	1	1	Dumviva Membro	984	995	
Finnlando	500	212	712	Nikaragvo	—	2	2	Honora Membro	22	22	
Francio	569	601	1170	Norvegio	340	100	440	Juna M-Jarlibro	147	181	
FR Germanio	965	473	1438	Nov-Zelando	88	66	154	Juna M-Abonanto	258	228	
Germana DR	682	29	711	Pakistano	—	5	5	Individuaj Membroj	6727	6556	
Greklando	379	23	402	Peruo	20	6	26	Aligitaj Membroj	21630	21543	
Gvatemalo	—	1	1	Pollando	4150	108	4258	Junaj Al. Membroj	8198	8525	
Hinda Unio	—	17	17	Portoriko	—	1	1	Membroj entute	36555	36624	
Hispanio	398	183	581	Portugalio	227	36	263	Societo Zamenhof	207	197	
Hongkongo	—	6	6	Reunio	—	1	1	Abonoj <i>Esperanto</i>	278	298	
Hungario	3082	165	3247	Rumanio	—	32	32	Kolektivaj ab. <i>Eo</i>	2115	1270	
Indonezio	—	3	3	Salvadoro	—	1	1	Abonoj <i>Kontakto</i>	252	231	
Irano	—	13	13	Sanmarino	—	1	1	Kolektivaj ab. <i>Kto</i>	120	137	
Irlando	42	11	53	Saud-Arabio	—	1	1	Patronoj TEJO	51	59	
Islando	23	42	65	Senegalio	—	1	1	Kotizoj entute	39578	38816	
Israelo	250	64	314	Singapuro	—	2	2	Vidu komenton kaj klarigojn aliloke en ĉi tiu numero de la revuo.			
Italio	1632	244	1876	Sirio	—	1	1				
Jamaiko	—	1	1	Soveta Unio	—	79	79				
Japanio	954	348	1302	Srilanko	—	4	4				
Jordanio	—	1	1	Sud-Afriko	44	24	68				
Jugoslavio	923	176	1099	Sudano	—	1	1				

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Strebas al ver' — ne POR sed PER...

Marjorie Boulton

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



frankoj. Prezo por komercistoj, kiuj mendas minimume 5 horloĝojn samtempe, estas (sen sendokostoj) 60 svisaj frankoj. Nur antaŭpagoj estos konsiderataj. Informas: Parzival, Esperanto-Lernejo, Juravorstadt 13, CH-2502 Biel, Svislando; telefono: (032) 23 15 80.

Internacia renkontiĝo okazos en Yvetot (Francujo) de la 29a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1983. Interesa distra programo. Petu informilon kaj aliĝilon skribante al: ges-roj Pottier, 21 allée des Roitelets, F-76190 Yvetot, Francujo.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

23-jara polino, laboranta en hospitalo, deziras korespondi: Graczyna Kraszewska, ul. Tuwima 5 m 47, PL-15-746 Białystok, Pollando.

Kun samaĝuloj deziras korespondi 13-jara knabino: Lizeth Gaitán, Colonia 14 de Septiembre, A n-ro 30, Apdo. 3912, Managua, Nikaragvo.

Ĵokeroj/ludkartaroj dezirataj kontraŭ Esperantaj libroj/gazetoj, diverslandaj: Sune Ahlm, Nygatan 20A, S-462 00 Vänersborg, Svedio.

San-bulteno: La neatendita morto de mia edzino instigis min eldoni bultenon kun konsiloj de mondfamaj sanigistoj kiel vivi pli longe kaj sane. Mi ne celas profiti. Male, mi rezignacias elspezi multon aĉetante novajn librojn kaj abonante san-revuojn krom tiuj kiujn mi jam regule ricevas. Provizora prezo de dek 8-paĝaj numeroj ŝipe senditaj estas dek dolaroj, kaj aere senditaj dek kvin dolaroj. Sendu abonon preslitere al: Sergio Docal, 3200 NE 36 St., Fort Lauderdale, Florida 33308, Usono.

La mondbildo de Martinus: Pri tiu temo deziras korespondi: Harald Andersson, Gillersv. 6E, S-712 00 Hällefors, Svedio.

Aerpoŝtaj papero kaj koverto, kun stelo kaj la vorto "Esperanto", haveblaj ĉe: Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio. Prezo: 200 belgaj frankoj por 50 folioj kaj 50 kovertoj (inkluzive de la afranko).

Internacia Esperanto-Semajno, Cannes: 25a de junio — 2a de julio. Kun ses ekskursoj ĉe la Lazura Marbordo; dulitaj ĉambroj kun privataj banĉambroj kaj necesejo. Tri manĝoj ĉiutage. 1950 francaj frankoj, ĉio inkluzivita. Informoj ĉe: **R. Llorens, "Hortensias", 121 bis blvd. Napoléon III, F-06200 Nice. Maksimume 50 personoj. Restas ankoraŭ kelkaj lokoj.**

1983 — Monda Komunika Jaro: Por bona komunikado ne sufiĉas komuna lingvo. Ni devas atenti la bezonojn de la aliaj. Ekkonu tiujn de vide, move kaj aŭde handikapitaj homoj pere de iliaj ideoj en: *Ne tiel sed ĉi tiel, Ĉu ne eblus ĉi tiel?* kaj *Trans la sonizolan muron* (po 2,70 gld. ĉe UEA-Libroservo).

Sciencfikcio estas la temo de niaj libroj: *Sferoj*. Ni serĉas pliajn kunlaborantojn. Skribu al: Grupo Nifo, Floranes 57-2º-C, Santander, Hispanio.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj: s-ro Dieter Kremp, Kastellstr. 17, D-7500 Karlsruhe 41, FR Germanujo.

Speciala rabato ĝis la fino de aprilo!

Okaze de la 20-jara ekzisto de Eldonejo & Librejo Sonorilo, vi ricevos 5-procentan rabaton por la aĉeto de ĉiu ekzemplero el la ĉi-sube menciitaj titoloj. Do, rabato ekde unu ekzemplero!

Amuzaj dialogoj en Esperanto (A. Lienhardt). 1980. 141 p. Ilus. Utila por kursekzercoj. Prezo: 210 BF.

Aniara (H. Martinson). 1979. 174 p. Bindita. Ĉefverko de nobelpremiito. Prezo: 560 BF.

Anni kaj Montmartre (R. Schwartz). 1974. 126 p. Populara originala romano. Prezo: 194 BF.

Antaŭen al la laboro! Plena verkaro de L.L. Zamenhof. Kajero 3. 1974. 344 p. Bindita. Traktas la jarojn 1892-1895. 780 BF.

Ĉu li bremsis sufiĉe? (J. Valano). Originala krimromano. 128 p. 225 BF.

Ĉu vi kuiras ĉine? (J. Valano). La unua romano de la nun fama Esperanto-aŭtoro. 1976. 600 BF.

El la vivo de bervalasentaĝulo (L. Beaucaire). Laŭ la subtitolo: "maldeceta epizodaro". 134 p. 190 BF.

La kanto pri fajr-ruĝa floro (J. Linnankoski). Traduko de finna romano pri la universala "Donjuan-problemo". 1978. 134 p. 280 BF.

Korespondajo ludovikologia. Interesege leterinterŝanĝo pri zamenhofologiaj demandoj. 1982. 271 p. 660 BF.

Ne tiel, sed tiel ĉi (F. Faulhaber). Konsilaro pri Esperanto-stilo. 63 p. 160 BF.

Plena ilustrita vortaro de Esperanto (ĉefred. G. Waringhien). Aŭtoritata kaj la plej ampleksa vortaro de Esperanto. 37 + 1303 p. Ilustrita. Bindita. 2080 BF.

Por kaj kontraŭ reformoj! Plena verkaro de Zamenhof. kajero 8. 1980. 381 p. Verkoj el la jaroj 1907-1908 (Ido-krizo). 780 BF.

Provo de gramatiko de novjuda lingvo (L.L. Zamenhof). Redaktis A. Holzhaus. 1982. 159 p. 234 BF.

Verkoj de Verda Majo. 1982. 501 p. Ilus. Bindita. Pli ol 50 artikoloj de la fama japana/ĉina esperantistino kaj revoluciulo. 350 BF.

Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de la libroj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 2000 BF — 20%, kaj por la mendoj super la valoro de 2000 BF — 10%. Minimumaj sendokostoj estas 100 BF. Pagante al Belgio per banko aŭ ĉeko, bonvolu aldoni 100 BF por la kostoj, kiujn deprenas la belgaj bankoj.

Mendu rekte ĉe: Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk (Antwerpen), Belgio. Sonorilo estas la sola oficiala Esperanta libroservo en Belgio (Belga Ŝtatgazeto: 1962 07 05 — n-ro 3229). ☎ (03) 827 24 05.

PARTICIPOJ KAJ KONJUGACIAJ FORMOJ EN ESPERANTO


de Olav Reiersøl

Pritraktas en tri ĉapitroj la uzon de verbaj formoj en Esperanto:

- I. Notoj pri aspektismoj, p. 7-46.
- II. Tempisma sistemo, p. 47-68.
- III. Komparoj, p. 69-85.

Entute 91 paĝoj. La unua ĉapitro pritraktas, interalie, la multajn malakordojn inter la diversaj aspektistaj reguloj.

Mendebla ĉe: Esperantoforlaget A/S, Olaf Schous vei 18, Oslo 5, Norvegio.



Dum preskaŭ duonjarcento, la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per *Streĉita kordo*. Nun, fine, *Izolo* prenas sian lokon apud ĝi. La unua eldono de *Izolo* fariĝis praktike kvinekzemplera, pro la militeksplodo en 1939. Ĉi tiu fotorepreso estas farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj.

Eldonis UEA, Rotterdam, 1977. 77p. 18cm. Bindita, kun ŝirmkovrilo. ISBN 92 9017 020 4. Prezo: 16,50 (por Ned. 17,16) gld. + afranko.

Fernando de Diego

LA PLEJ MODERNA LERNOLIBRO POR LA PAROLANTOJ DE LA HISPANA

- ⇒ Induktiva metodo surbaze de tekstoj kaj fraz-modeloj
- ⇒ Tre multnombraj ekzemploj kaj ekzercoj kun ŝlosilo
- ⇒ Praktikaj informoj pri la Esperantomovado kaj -literaturo


**Verkis: Fernando de Diego, Akademiano,
la tradukinto de *Don Kiĥoto***

PLI OL 200 PAĜOJ

PREZO: 5 US \$
aŭ egalvaloro

ELDONIS :

HEROLDO
DE ESPERANTO



Audrey Childs-Mee

Saluton!

Esperanto aŭtodidakte

Internacia lernolibro de la Internacia Lingvo

Jen tutnova Esperanta lernolibro por komencantoj. Ĝi estas verkita laŭ la principoj de rektmetoda lingvoinstruado kaj ĝi kontentigas precipe la bezonojn de meminstruantoj, sed ĝi samtempe taŭgas ankaŭ por lernado kun kursgvidanto. Tiucele fine de la libro troviĝas skizaj indeksoj kaj ŝlosilo (respondoj al ekzercoj). **Tiu ŝlosilo nun estas aĉetebla (ĝi kostas duonon de la libroprezco — vidu ĉi-sube) ankaŭ kiel sonkaseto.** La ekzercojn legas Helga Rapley kaj John C. Wells el Londono, ambaŭ konataj pro sia perfekta prononco de Esperanto. La lernolibro estas plenplena de trafaj ilustraĵoj.

240 paĝoj presitaj sur tre fortika papero, kolora kovrilo. Prezo nur: GM 19.85; Gld. 24; £ 5,60; FF 60; US\$ 8,50 aŭ Bfr. 420, plus 10% por la sendokostoj. Aĉetu tuj 3 ekzemplerojn, kaj pagu nur 2. Mendu ĉe la eldonejo: TK/Stafeto, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, aŭ ĉe via libroservo.

ESPERANTO kaj LIBERECO

bela grandformata nova disko de Max Roy Carrouges

Ene de ĉi tiu revunumero vi povas legi tre favoran recenzon pri ĉi tiu nova, tute originala kaj aparte bele eldonita gramofondisko, kiun eldonis la firmao **ARION** en Parizo. Mendu vian ekzempleron ĉe **Eldonejo & Librejo Sonorilo**. Kutima revendista rabato por ĉiuj, kiuj samtempe mendas 5 ekzemplerojn. **Prezo: 425 belgaj frankoj**, plus la sendokostoj. Mendu ĉe: **Eldonejo & Librejo Sonorilo, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk (Antwerpen), Belgio**, ĉe la Libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo.

Kaptu la okazon!

Trigroŝa romano por 7,50 DM

Berthold Brecht, *Trigroŝa romano*, 374 paĝoj, tole binita, kun multkolora kovrilo; antaŭe 24 DM, nun havebla por 7,50 DM inkl. sendokostojn!

Sendu simple 7 respondkuponojn por 1 ekzemplero, 11 rpk. por 2 ekz. 14 rpk. por 3 ekz., kaj 3 rpk. por ĉiu plia ekzemplero. Samtempe kun la libro(j) vi ricevos nian Libroliston n-ro 7 kun ĉ. 1000 titoloj (libroj, diskoj, kasedoj, diversaĵoj).

Esperanto-Centro, pf. 1450, D-4790 Paderborn
Ni aranĝos trajn-karavanon al la UK en Budapeŝto!

LA CENTRA OFICEJO DE UEA SERĈAS PLI DA OFICIST(IN)OJ

UEA serĉas novajn oficist(in)ojn por sia Centra Oficejo en Roterdamo. Temas parte pri transpreno de jam ekzistantaj taskoj, sed parte ankaŭ pri plivastigo de la profesia agado sur novaj kampoj. Jen konciza priskribo de la oficoj:

Ĝenerala direktor(in)o

Taskoj: Superrigardo kaj gvido de la tutaj administrado kaj financo de la Asocio kaj kunordigo de ĝiaj oficejoj (nuntempe: Roterdamo, Antverpeno, Nov-Jorko kaj Budapeŝto). [La nuna Ĝenerala Direktoro forlasos tiun oficon en majo.]

Kvalifikoj: Sperto unuavice pri oficeja administrado, duavice pri la Esperanto-movado; matura, reprezenta kaj diplomatia personeco.

Eldonredaktist(in)o

Taskoj: Evoluigo de la eldona agado; pritrakto de manuskriptoj, eldonkontraktoj, pres-ofertoj ktp; helpo al (kaj laŭbezzone anstataŭado de) la redaktoroj de la asociaj periodaĵoj kaj de la administranto de la Libroservo.

Kvalifikoj: Sperto pri eldonado kaj redaktado; unuaranga lingva nivelo en Esperanto kaj laŭeble en aliaj lingvoj; komercaj interesoj kaj kompreno pri la Esperanta eldon-merkato. Por tiu ĉi ofico estas eventuale konsiderebla laboro en la Grafika Centro Antverpeno anstataŭ la C.O.

Oficist(in)o por turismo

Taskoj: Evoluigo de turismaj servoj (grupvojaĝoj, vojaĝinformoj, ĉirkaŭkongresaj aranĝoj k.s.); kunlaboro en la administrado de la Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso.

Kvalifikoj: Atestebla kapablo pri turisma komerco; aktiva scipovo de kelkaj naciaj lingvoj; matura, iniciatema personeco.

Kontist(in)o

Taskoj: Helpo al (kaj laŭbezzone anstataŭado de) la nuna (parttempa) kontistino; aliaj taskoj laŭ kvalifikoj kaj interkonsento.

Kvalifikoj: Sperto pri kontumado, laŭeble ankaŭ pri valutoj kaj bilancoj; precizeco kaj kunlaboremo. Por ĉi tiu ofico estas konsiderebla ankaŭ parttempa laboro.

Sekretari(in)o

Taskoj: Ĝenerala administra laboro; korespondado; helpo en aliaj fakoj laŭbezzone.

Kvalifikoj: Bona lingva nivelo en Esperanto; rapida tajpkapablo; ordemo kaj kapablo labori memstare.

Por ĉiuj ĉi oficoj eblas ankaŭ ia rekombino de la priskribitaj taskoj, depende de la kvalifikoj kaj interesoj de la kandidatoj. La salajroj de la C.O. nuntempe troviĝas inter 2000 kaj 3100 gld. monate malnete (+ ekstraĵoj) por tuttagaj oficoj. La salajro-nivelo por la anoncitaj oficoj dependos de la sperto kaj kvalifikoj. Se vi interesiĝas, petu demandaron de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, aŭ informiĝu telefone: (010) 361539.